# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*


Antaŭ 100 jaroj: La Peterburga parolado de Zamenhof

Tra Esperantujo

Komenský estus fiera en la Esperanto-urbo

Ĉu Belgio eksplodos?

Komputilaj novaĵoj

Reage al la recenzo de Reinhard Haupenthal

Sergio Pokrovskij pri "fandi" kaj/aŭ "gisi"

Nia poezio: Poemoj de Baldur Ragnarsson

István Ertl pri "Vojaĝo al Kazohinio"

Nia virtuala biblioteko






2010 5

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2010. №5 (187)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** sezonoj@kanet.ru

**Hejmpaĝo** http://Esperanto.Org/Ondo

**Abontarifo por 2010**

*Internacia tarifo*: 38 eŭroj
*Orienteŭropa tarifo*: 20 eŭroj
*Ruslanda tarifo*: 590 rubloj
*Pollanda tarifo*: 60 zlotoj
*Aerpoŝta aldono*: 5 eŭroj
*Elektronika abono (pdf)*: 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara Ondo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 600 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo*: 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo*: 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo*: 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo*: 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj*: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.



**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.



"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2010, №5 (187).
Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.
Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.
Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.
Редактор: Корженков А. В.
Подписано в печать: 19 апреля 2010 г.
Цена свободная. Тираж: 600 экз.
Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.


## Redakcie

Lastatempe la mondo ne estis trankvila. Antaŭ la Pasko teroristoj aranĝis du eksplodojn en la Moskva metropoliteno, baldaŭ okazis pliaj bomb-eksplodoj en la Norda Kaŭkazo. Poste en avia katastrofo pereis la Pollanda prezidento Lech Kaczyński, lia edzino kaj multaj reprezentantoj de la armea kaj politika elitoj de Pollando. Sekvis sismo en Ĉinio kaj erupcio en Islando. Probable, ĝis la alveno de la revuo al vi okazos pliaj akcidentoj kaj incidentoj. Sed pri ili vi ekscias el nacilingvaj radioj, televidoj, tagĵurnaloj kaj novaĵ-retejoj ege pli rapide ol el nia monata gazeto, kaj ni ne presigas tiajn informojn.

Se temas pri ĉi tiu kolumno, en ĝi siajn komentariojn prezentas laŭvice Komitatano Z, Alen Kris, kaj ni: la eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo*. Nu, ni devintus esti ĉi tie antaŭ unu monato, sed ni cedis nian vicon al Alen, ĉar en Kaliningrado estis interesaj raportindaĵoj, kaj ĉar ni preferis alparoli vin nur post certiĝo pri kelkaj projektoj, kiuj estis ne tute klaraj pasintmonate. Nun la certeco venis, kaj vi povas konatiĝi kun tiuj projektoj.

Pri unu el ili vi jam legis en februaro, nome, pri elektronikaj libroj. La *Virtuala biblioteko de Sezonoj* jam estas lanĉita. Nun ĝi konsistas el kvar libroj, kaj ĉiu ret-uzanto povas en ajna momento elŝuti la librojn el nia retejo kaj tuj eklegi ilin. Ne necesas mendi, ne estas risko ke la libro intertempe elĉerpiĝos, ne necesas longe atendi la poŝtan liveradon. Ne necesas eĉ pagi — nur poste kelkaj libroj estos aĉeteblaj (malpli koste ol la paperaj) en la nun establata internacia retbutiko. Legu pli en la 21a paĝo.

La eldonado de elektronikaj libroj ne rezignigas nin pri la tradicia eldonado. En junio en Kaŭno, danke al la kunlaboro kun la Litova Esperanto-Asocio, aperos kvar novaj libroj de *Sezonoj*: du kolektoj de *Nia trezoro*, konciza biografio de Zamenhof, kaj reeldono de la Aulda traduko de *La ĉashundo de la Baskerviloj*.

*Radio Esperanto* reakuratiĝis. Tri novaj sonprogramoj aperis ĉi-printempe, kaj la plej freŝa estis la unua, registrita helpe de la mikrofono *Røde Podcaster*, fabrikita speciale por podkastistoj. Ni aĉetis ĝin danke al nia fondaĵo *Ilaro*. Koran dankon pro viaj donacoj!

Definitiviĝis nia kongres-sezona plano. Fine de majo la redaktoro de *La Ondo* prelegos pri Zamenhof kaj prezentos *Sezonoj*n kaj *La Ondo*n en Peterburgo, kadre de la landa kongreso esperantista. Fine de junio ni ambaŭ venos al la 46a BET en Visaginas (Litovio), kaj komence de julio ni partoprenos FREŜOn en la najbara Pollanda urbo Olsztyn. Poste ni atendos dezirantojn veni al Kaliningrado por konatiĝi kun la plej okcidenta Ruslanda regiono.

Ni ĝoje renkontiĝos kun niaj legantoj en Peterburgo, Visaginas, Olsztyn kaj en Kaliningrado, sed nur malmultajn el vi ni povos vidi, ĉar grandas la kongres-sezona oferto, kaj ni ne povas veni ĉien, kie estos niaj legantoj, ankaŭ ne al SES-2010 en Slovakio, kien invitas vin la kovropaĝa foto, sendita de Peter Baláž.

***Agrablan kongresan sezonon ĉie en Esperantujo!***

***HaGo*** ***AlKo***

# En bona horo ni komencu nian laboron!

## de D-ro L. L. Zamenhof

**Antaŭ cent jaroj, la 20–25an de aprilo (Gregorie: la 3–8an de majo) 1910, en Peterburgo okazis la 1a Ruslanda Esperantista Kongreso. La 21an de aprilo 1910, vespere, en la granda salono de la Peterburga Dumo (urbestraro) okazis festkunveno, en kiu Zamenhof alparolis en Esperanto ĉirkaŭ 600 kunvenintojn. Sube estas la teksto de lia parolado.**

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Vi eble miros, ke mi parolas al vi ne ruse, sed Esperante; vi eble diros, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estus multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kaŭzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolo tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj pro kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj, disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan Esperantan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la *eduka* signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli Esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere edukas konvinkitajn, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole *pri* Esperanto, sed ankaŭ *per* Esperanto.

Sed se en *ĉiu* nacia kongreso esperantista la Esperanta parolado estas tre dezirinda, ĝi estas ankoraŭ pli dezirinda speciale en *nia* regno, en la vasta Ruslando. Nia grandega regno, kiu etendiĝas de la Karpatoj ĝis la Paca Oceano kaj de la "malvarmaj Finnaj rokoj ĝis la flama Kolĥido", nia regno estas tiel mikskonsista, ke ĉiu tutruslanda kongreso estas iom simila al kongreso internacia. Miksita estas la loĝantaro ankaŭ en aliaj regnoj, sed tie la *karaktero* de la reciprokaj rilatoj inter la popoloj estas alia ol ĉe ni.

Mi ne volas ĉi tie analizi la kaŭzon de ĉi tiu fakto, ĉar tiu devigus min eniri en regionon politikan, kion mi deziras eviti; mi nur konstatas la fakton. Pro la ekzistado de tiu fakto, dum longa tempo ankoraŭ en nia regno ne povas okazi kongresoj efektive tutruslandaj, en kiuj kun plena volonteco kaj plena sincereco partoprenus ĉiuj popoloj de la Ruslanda regno. Ankoraŭ dum longa tempo efektivaj kaj sincere partoprenataj kongresoj de la ruslandaj popoloj povas okazi nur sur fundamento neŭtrala. La unua el tiaj kongresoj estas la nuna tutruslanda kongreso esperantista. En la kongreso, kiu nun malfermiĝas, ne ekzistos konkurantoj kaj malamikoj, ne ekzistos humiligantoj kaj humiligatoj, ekzistos nur samideanoj kaj samregnanoj. Tial mi ĝoje salutas la unuan Ruslandan Esperantistan kongreson; mi salutas ĝin duoble: kiel esperantisto kaj kiel Ruslandano.




Antaŭ cent jaroj en Peterburgo: Postnikov (2), Zamenhof (1), Korzlinskij (3) fotitaj en la impona salono de la Peterburga urbodomo antaŭ grandega portreto de Nikolao II. (Foto el *Universala Ĵurnalo*, 1911, №1)

Ne granda estas nia nuna kongreso, ĉar oni komencis ĝian preparadon tro malfrue. Tre malmulte da ruslandaj esperantistoj partoprenas en ĝi, tre malmulte da ruslandaj popoloj havas en ĝi siajn reprezentantojn. En efektiveco ĝi estas nur komenco kaj provo, ĝi estas nur prepara paŝo por la estontaj ruslandaj esperantistaj kongresoj. Mi tamen ne dubas, ke nia prova kongreseto ne restos sen utilo por la esperantismo en Ruslando. Malgraŭ niaj malgrandaj fortoj, mi esperas, ke la kunvenintaj samideanoj povos meti kelkajn fundamentajn ŝtonojn, sur kiuj poste konstruiĝos ĉiam pli kaj pli grandioza ruslanda esperantismo.

Mi esperas, ke dank' al nia penado ni baldaŭ ne bezonos honti antaŭ la eksterlando kaj nia afero staros en nia regno tiel same bone kaj fortike, kiel en aliaj landoj. En bona horo ni komencu nian laboron!

*La Ondo de Esperanto*, 1910, №6–7.

## UEA kresketis en 2009

Laŭ la tradicia statistiko, aperinta en la aprila kajero de *Esperanto*, en la jaro 2009 la Universala Esperanto-Asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM) je 11 membroj pli ol en 2008. En la kongreslando de 2009, Pollando, la nombro duobliĝis de 120 al 245 membroj. La plej granda falo estis en Ruslando: de 209 al 165 membroj.

La nombro de aligitaj membroj (AM, t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj de UEA, kiuj ne estas IMoj), kreskis al 12605 (+113 kompare kun 2008). La tuta membraro de UEA nombris 18318, je 124 pli multe ol antaŭ unu jaro.

Antaŭ 50 jaroj, en 1959, en UEA estis 25146 AMoj kaj 7442 IMoj, entute — 32588 membroj. Vidu la evoluon inter la jubileaj jaroj 1987 (100-jariĝo de Esperanto) kaj 2009 (150-jariĝo de Zamenhof).

| Jaro | AM | IM | Sume |
|---|---|---|---|
| 1987 | 36351 | 7291 | 43642 |
| 1988 | 35945 | 7203 | 43148 |
| 1989 | 32474 | 7355 | 39829 |
| 1990 | 25224 | 7645 | 32869 |
| 1991 | 19146 | 8071 | 27217 |
| 1992 | 18808 | 7783 | 26591 |
| 1993 | 16041 | 7272 | 23313 |
| 1994 | 14495 | 7018 | 21513 |
| 1995 | 13808 | 7237 | 21045 |
| 1996 | 13314 | 7284 | 20598 |
| 1997 | 13035 | 7122 | 20157 |
| 1998 | 12812 | 7360 | 20172 |
| 1999 | 12096 | 7075 | 19171 |
| 2000 | 12522 | 6583 | 19105 |
| 2001 | 12835 | 6479 | 19314 |
| 2002 | 10549 | 5713 | 16262 |
| 2003 | 11264 | 5714 | 16978 |
| 2004 | 12148 | 5854 | 18002 |
| 2005 | 12253 | 6107 | 18360 |
| 2006 | 11732 | 6066 | 17798 |
| 2007 | 11477 | 6011 | 17488 |
| 2008 | 12492 | 5702 | 18194 |
| 2009 | 12605 | 5713 | 18318 |

La nombro de landoj kun la membroj de UEA kreskis de 121 al 124. Danke al 1570 aligitaj membroj Hungario denove plej altas en la unua landodeko de UEA.

| Lando | AM | IM | Sume |
|---|---|---|---|
| Hungario | 1570 | 98 | 1668 |
| Japanio | 948 | 402 | 1350 |
| Germanio | 806 | 539 | 1345 |
| Ĉinio | 1051 | 105 | 1156 |
| Francio | 418 | 611 | 1029 |
| Pollando | 700 | 245 | 945 |
| Italio | 741 | 195 | 936 |
| Usono | 504 | 302 | 806 |
| Belgio | 443 | 155 | 598 |
| Brazilo | 202 | 381 | 585 |

**AlKo**

95a Universala Kongreso de Esperanto

Havano, 17–24 julio 2010

## Voĉdonado komenciĝis en UEA

Per la dissendo de balotiloj al ĉ. 4500 membroj, kiuj jam kotizis por 2010, komenciĝis la elektado de Komitatanoj B, kiuj reprezentos la individuajn membrojn en la Komitato de UEA dum 2010–2013. Ĉiu membro rajtas voĉdoni por 6 el 13 kandidatoj, kies sinprezentoj akompanas la balotilon. Por partopreni en la voĉdonado, necesos resendi la balotilon tiel, ke ĝi atingu la Centran Oficejon plej laste la 31an de majo.

La kandidatoj estas Marija Belošević (Kroatio), Paulo Branco (Belgio), Tomasz Chmielik (Pollando), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Probal Dasgupta (Hinda Unio), Johan Derks (Nederlando), Mark Fettes (Kanado), Jukka Pietiläinen (Finnlando), Barbara Pietrzak (Pollando), Josip Pleadin (Kroatio), José Antonio Vergara (Ĉilio), Amri Wandel (Israelo) kaj Wu Guojiang (Ĉinio). Estis kandidatigita ankaŭ Lee Jung-kee (Koreio), kiu tamen retiriĝis.

La Centra Oficejo daŭrigos sendi balotilon ankaŭ al la malfruaj kotizontoj ĝis iom antaŭ la fino de majo. En la daŭro de la voĉdonado la CO informos de tempo al tempo pri la nombro de la ricevitaj balotkovertoj, por ke interesitoj povu sekvi la evoluon de la aktiveco. Ĉar pluraj membroj rajtas resendi siajn balotilojn en sama koverto, la precizan nombron de balotiloj oni ekscios nur post la fino de la voĉdonado, kiam la kovertoj estos malfermitaj. Tial oni nepre ne enmetu en saman koverton ion ajn alian kun la balotilo. Kunsendo de balotilo k.a. korespondaĵoj en sama koverto eblas nur, se la balotilo troviĝas en aparta koverto. Eblas transdoni balotilon ankaŭ surloke en la CO.

En la antaŭa fojo, en 2007, balotado ne okazis, ĉar estis malpli da kandidatoj ol disponeblaj lokoj. En 2004 estis dissenditaj 5140 balotiloj, el kiuj revenis 1491, t.e. 29,0%. En 2001 voĉdonis 1887 membroj el 6010, t.e. 31,4%. Rekorda aktiveco estis en 1998, kiam voĉdonis 2328 membroj el 6920, t.e. 33,6%.

**GK UEA**

## Havano superis Vankuveron

Je la 17a de aprilo al la 95a Universala Kongreso de Esperanto en Havano aliĝis 833 personoj el 59 landoj. Plej multaj aliĝintoj estas el la kongreslando Kubo — 120. Sekvas Francio 106, Japanio 70, Germanio 64, Brazilo 59, Italio 41, Nederlando 30, Belgio 24, Pollando 21, Meksiko 19.

Ĝis nun aliĝis nur du kongresanoj el Usono, kies registaro ne favoras kontaktojn de usonanoj kun Kubo. Sed spite al la Usona politiko kaj malgraŭ pesimismaj prognozoj, la Havana UK ne estos la plej malgranda postmilita kongreso, ĉar la 69a kongreso en Vankuvero en la jaro 1984a havis nur 802 aliĝintojn. Eble la partoprenantaro eĉ superos ankaŭ tiun de la 57a UK en la Usona urbo Portlando, kiu allogis 923 personojn en la jaro 1972a.

Ĝi estas la dua Universala Kongreso en Kubo. Antaŭ dudek jaroj al la 75a UK en Havano aliĝis 1617 personoj.

**Laŭ** http://uea.org

## Denove ĉe PEN-konferenco

En la 42a Internacia PEN-konferenco, okazinta fine de marto en Bledo (Slovenio), la Esperantan PEN-Centron reprezentis György Nanovfszky kaj Giorgio Silfer.

En la ronda tablo *Literaturo kaj globaliĝo* Giorgio Silfer prelegis pri "Globaliĝo kaj diasporoj: la kazo de la esperanta". Lia kontribuo ricevis multajn aplaŭdojn kaj vekis multe da intereso. Unu el la konkretaj rezultoj de tiu intereso estas la invito al la Esperanta PEN-Centro prelegi en decembro 2010 ĉe internacia simpozio organizata en israela universitato.

La reprezentantoj de la esperanto-literaturo havis gravan renkonton kun la prezidanto de PEN Internacia, John Ralston Saul, kaj la sekretario, Eugen Schoulgin, okaze de la internacia konferenco pri poezio en Bledo, Slovenio. Nanovfszky kaj Silfer diskutis kun la du internaciaj PEN-gvidantoj pri lingvaj rajtoj, specife en rilato kun minoritataj lingvoj en eksa Sovetunio, tereno kie PEN-Klubo ĝis nun agadis malmulte.

La kontakta rolo de la Esperanta PEN-centro estis aparte aprezita de Saul kaj Schoulgin. Same aprezata estis la kontribuo dum la kunveno de la Pac-Komitato, kiu interalie ellaboris proponon por paca iniciato en Proksima Oriento.

**HeKo**

## Feliĉan Paskon!

La 4an de aprilo, je la Pasko, kiun ĉi-jare samtempe festis la kristanoj laŭ la Julia kaj Gregoria kalendaroj, post sia mesaĝo *Urbi et Orbi* en la placo Sankta Petro, Papo Benedikto la 16a bondeziris en 63 lingvoj. En Esperanto li diris: *Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta!*

La bondeziron en Esperanto akceptis ĝojoplena kriego de la esperantistoj kiuj venis malgraŭ pluvo. Dum la Esperantlingva bondeziro de la Papo, la samtempa monda televida elsendo montris la esperantistojn kaj la panelojn kun la vorto "Esperanto", kiujn alte tenis la esperantistoj por la 18a sinsekva fojo. Gianni Conti estis intervjuita de televidstacio.

**Laŭ** www.ikue.org




## Pollando: Esperanto por EU

La 29an de marto tri reprezentantoj de la iniciata grupo "Esperanto por EU" (Francisko Witucki, prezidanto de la Esperanto-grupo en Wągrowiec; Eduardo Kozyra, vicprezidanto de PEA; Kazimiro Krzyżak, iniciatinto de la grupo) renkontiĝis kun eksministrino pri edukado kaj nuna parlamentanino prof. Krystyna Łybacka.

Dum la kunveno la parlamentanino montris multajn sciojn pri Esperanto kaj ideoj de Zamenhof. La eksministrino esprimis sian apogon al la agado de la iniciata grupo kaj deklaris sian helpon en la realigo de la starigitaj postuloj:

1. Doni al Esperanto la juran statuson de la vivanta lingvo, samranga kun la aliaj fremdaj lingvoj en la Pollanda edukad-sistemo de ĉiuj ŝtupoj.
2. Elpaŝi kun projekto al EU por akiri financajn subtenojn al tiu celo.
3. Doni ISO-kodon al Esperanto en Pollando.
4. Jure aprobi sciencajn titolojn, atestojn, diplomojn en Esperanto (i.a. de AIS).
5. Iniciati fare de la maldekstra parlamenta frakcio ŝanĝon de la nuna leĝo pri juraj tradukistoj de Esperanto.

**Eduardo Kozyra**

## Ponto inter kulturoj: Esperanto en la 3a Mezorienta Kunveno en Turkujo

Esperantistoj tre ofte prezentas Esperanton kiel ponton inter kulturoj. Estas tamen unu rivero, en kiu la ponto apenaŭ funkcias, la rivero inter la okcidenta/eŭropa kulturo kaj la orienta/islama kulturo.

La nefunkciado ne ŝuldiĝas al la ponto mem, sed al la fakto ke ĝi posedas nur unu flankon, ke ĝi estas nur duona ponto. Fakte Esperanto ne estas sufiĉe konata en kelkaj partoj de la islama mondo, ĉefe mi pensas pri la arablingvaj landoj.

Tiun situacion provas ripari la Mezorientaj Kunvenoj inter eŭropaj esperantistoj kaj esperantistoj el kiom eble pli da landoj de tiu regiono.

La ĉi-jara Mezorienta Kunveno okazis inter la 2a kaj la 5a de aprilo 2010 en la turka urbo Eskiŝehiro. Ĝin partoprenis deko da eŭropanoj el diversaj landoj, unu israelano kaj dekkvino da turkoj. Laŭ la tradicia strukturo de tiu kunveno estis prelegoj en Esperanto kaj debatoj.

Prelegis Ben Indestege pri sia vojaĝo tra la Meza Oriento. Li petveturis tra Egiptujo, Sudano, Etiopujo kaj poste Kipro kaj Turkujo, kaj tre vivece rakontis pri siaj spertoj.

Eĉ pli vigle Mireille Grosjean el Svislando prelegis pri sia laboro dum la kunsidoj en Ĝenevo de la Konsilantaro de UN pri Homaj Rajtoj, kie ŝi reprezentas UEA-n kune kun aliaj esperantistoj.

La pontlingva funkcio de Esperanto, tamen, estis pli evidenta en la diskutoj pri aktualaj temoj, ekzemple pri la islama vualo.

La turkaj partoprenantoj estis plejparte junaj: duone knaboj kaj duone knabinoj el la senvuala speco, dum en Turkujo nuntempe oni vidas duonon de la virinoj (mia takso) kun kaptuko kaj tre malofte kun vizaĝokovra vualo. Ne estis, kaj ne povas esti, konkludoj el tiu debato, sed oni komprenis, ke la problemo estas tre pli malsimpla ol oni ŝatas prezenti ĝin kaj en Eŭropo kaj en islamaj landoj.

Ĉiuokaze la 3a Mezorienta Kunveno estis tre bona okazo, por ke turkaj esperantistoj renkontiĝu inter si. La knaboj venis el istanbula lernejo, kie instruas Murat Osdizdar, unu el la organizantoj de la kunveno, kaj ili jam de du jaroj sekvas kursojn (interalie de Tereza Kapista), havas propran Esperanto-klubon, ktp.

Alia turka organizanto, Can Zamur, estas la homo, kiu tenas la kontaktojn kun ĉiuj esperantistoj en la lando, kaj li povis konatiĝi en Eskiŝehiro kun kelkaj retaj lernantoj el aliaj turkaj urboj, kiuj pretis aperi por paroli en Esperanto la unuan fojon en sia vivo kun vivantaj homoj.

La iama Turka Esperanto-Asocio nun eble pretas renaskiĝi en nova formo, kiel reta kunligo sen burokrataĵoj sed kun agadoj laŭ la etoso en la lando, kiu parte similas al la rekonstruo-etoso en okcidenta Eŭropo en la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento: oni konscie moderniĝas sed, en Turkujo, kun atento al la tradicio.

**Renato Corsetti**

Ĉu la kunveno en Eskiŝehiro estas komenco de nova tradicio? *(Fotis Sergeo Tyrin)*





Keksanoj gaje saltas *(Fotis Leo Sakaguchi)*

## La Paska Kekso

Dum la Paskaj tagoj 21 homoj venis al Hamburgo okaze de *Kekso* por eklerni Esperanton aŭ paroli ĝin, renkonti interesajn homojn, ludi kaj dolĉaĵumi.

La programo konsistis el lingvokursoj kaj ekskursoj, sed kiel kutime ni manĝis dolĉaĵojn. Vendredo estis la interkonatiĝado kaj informado pri Esperanto por novuloj. Sabate, escepte de la kursoj, ni partoprenis en la internacia kapkusenbatalado antaŭ la Hamburga urbodomo. Dimanĉe ni vestis kaj elprovis sesmejl-botojn per kiuj oni povas salti kaj kuri rapide. Vespere ni rigardis la filmon *Berlino vokas* kun Esperantaj subtitoloj (tradukita de Sophia Berlin). La lundan antaŭtagmezon ni interbabilis pri la pasinta renkontiĝo kaj priparolis, kion eblos plibonigi venontfoje.

Tiu renkontiĝo denove tre plaĉis al mi, kvankam dum la venontaj tagoj mi ne plu povos manĝi dolĉaĵojn.

**Leo Sakaguchi**

## 26a PSI

La 26a Printempa Semajno Internacia okazis 2–9 apr 2010 en St. Andreasberg en la meza montaro Harz kun pli ol 160 partoprenantoj el 17 landoj. Triono estis junuloj kaj infanoj. Denove estis la kutima riĉa programo pri prelegoj, ekskursoj kaj vespera kultura programo. Kulminoj estis la pupteatraĵo *La eta sorĉistino* (Christoph Frank tradukis kaj prezentis ĝin, originala infanlibro de Otfried Preußler) kaj la koncerto de la litovia muzikgrupo *Asorti.*

12 partoprenantoj trapasis la novajn lingvoekzamenojn (KER). Zsófia Kóródy kaj Christoph Krick (anoj de la ekzamena komisiono) estas tre kontentaj pri la rezultoj.

**Jörg Gersonde**

## Komenský estus fiera

COMENIUS estas instruprogramo por lernejoj, realigata per financaj rimedoj de la Eŭropa Unio. Unu el ĝiaj celoj estas disvolvi inter junuloj kaj instruistoj scion pri diverseco de kulturoj kaj Eŭropaj lingvoj kaj kompreni ĝian valoron.

La nomo de la programo devenas de la familia nomo de Jan Amos Komenský (1592–1670) — elstara ĉeĥa pedagogo, filozofo, fondinto de la moderna pedagogio. Li ankaŭ skribis pri la neceso de universala lingvo, kiu devis esti neŭtrala, facila kaj bela, por ke la homoj povu kun plezuro lerni kaj interparoli ĝin.

9–13 apr en Herzberg pasigis neforgeseblajn momentojn gelernantoj, iliaj gepatroj kaj instruistoj de la Comenius-projekto. La projekton por 6–12-jaraj gelernantoj realigas tri partneroj: Nicolai Grundschule el la Esperanto-urbo Herzberg am Harz (Germanio), Komlóstetői Általános Iskola el Miskolc (Hungario) kaj Bar Hill School apud Cambridge (Britio).

La trilanda projekto daŭras ekde 2008. La germanan grupon gvidis Zsófia Kóródy kaj Otto Kern, Esperanto-instruistoj. La hungaran grupon gvidis Ilona Fedor, Esperanto-instruistino. La anglan grupon gvidis la vicdirektoro de la lernejo Sanjay Mistri kaj Esperanto-instruisto kaj organizanto de la projekto Comenius, Tim Morley.

Mi estis surprizita per kortuŝa renkontiĝo (9 apr) de ĝojaj infanoj brakumantaj unu la alian, de gepatroj kore salutantaj aliajn gepatrojn el la partneraj landoj. Bela momento estis observi kiel ankaŭ per Esperanto infanoj helpas interkompreniĝi al siaj gepatroj.

Matene sabate (10 apr) en Nicolai Grundschule okazis festa bonvenigo. La direktoro de la gastiga lernejo, Frank Keller bonvenigis ĉiujn, tradukis Zsófia Kóródy kaj Tim Morley. Nome de ILEI dulingve salutis ĝia sekretario, Małgosia Komarnicka.

Poste ni komune ekskursis. Malgraŭ malvarma vetero ĉiuj estis kontentaj vizitante la minej-muzeon en Clausthal-Zellerfeld. Samtage ni vizitis ankaŭ la ĉarman urbon Goslar admirante la urban horloĝon kun moviĝantaj figuroj kaj aŭdante muzikon de sonoriletoj.

Dimanĉe ni vizitis Braunlage (migrado sur la monto Wurmberg), kie ĉiuj spertis multajn interesajn travivaĵojn, admirante kaj fotante belan panoramon kaj eĉ linkojn. La saman tagon la gastoj ĝuis naĝadon en Osterode.

Lunde oni pasigis preskaŭ la tutan tagon en Nicolai Grundschule komune ludante, kantante, preparante vesperan programon kaj tagmanĝante. Dum la paŭzo la instruistoj kaj lernantoj vizitis Esperanto-bibliotekon en ICH (Interkultura Centro Herzberg).


La vespera programo okazis en la lerneja aŭlo. Ĉeestis ĝin ankaŭ gravaj personoj, reprezentantoj de organizaĵoj kaj asocioj el Herzberg. Dum la vespero unue ni vidis la filmetojn pri la sukcesa laboro de la projektpartneroj kaj poste okazis bunta, bela kaj emociplena parto preparita de infanoj el la tri landoj en Esperanto. Ni admiris, ofte kun larmeto en la okuloj, kantojn, versaĵojn kaj dancojn de junaj ĉeestantoj de la projekto. La vespero finiĝis per reciproka donacado kaj komuna vespermanĝo.

La kvartaga renkontiĝo okazis danke al dujara projekto kadre de la programo Comenius, kiu celas subteni internaciajn lernejajn kontaktojn. La lernantoj lernas Esperanton kaj uzas ĝin diversgrade, tamen rimarkante, ke Esperanto fariĝas "la pontolingvo" inter ili. Unue la lernantoj renkontiĝis en Britio, poste en Hungario kaj nun en Germanio.

**Małgosia Komarnicka**




Diverslandaj infanoj apud ICH *(Fotis M.K.)*




## El la vidpunkto de organizanto

3–5 apr 2010 en Hiliono (apud San-Briego) okazis la 65a Kongreso de SAT-Amikaro (franclingva asocio de SAT) kun 240 esperantistoj el kvin landoj, ĉefe el Francio.

La kongresa temo *Ni krizkontraŭu!* kongruis kun debatoj pri protekto de la medio (akvo, abeloj, energio, klimato), solidareco kaj pli feliĉa vivo. Ankaŭ kongruis la 950 manĝoj el ekologiaj nutraĵoj kaj transportoj per busoj. Tiu kongreso ne nur koncernis la membrojn de la asocio, kiuj kunvenis en asembleoj kaj malkovris regionajn pejzaĝojn kaj la bretonan lingvon, sed ankaŭ la publikon, kiu spektis la artajn vesperojn kaj malkovris Esperanton. Lokaj gazetoj, radioj kaj televido plurfoje sendis informojn pri la kongreso kaj pri Esperanto.

La oficialajn protokolojn oni povas legi en la retejo www.sat-amikaro.org. Sed kiujn memoraĵojn ĉiu el ni konservos pri tiuj plenriĉaj tagoj? Certe dependas de la personoj. Kiel membro de la organiza komitato mi ne povas rakonti pri la prelegoj kaj debatoj.

Mi tamen ĉeestis la kulturvesperojn. Tial, mi plezure dancis kaj kantis dank'al bretona muzikaro Mervili sabatvespere.

Dimanĉvespere mi kantis unuafoje en la koruso *Interkant'*. Verŝajne ni ankoraŭ kantos plurfoje kun pligrandiĝanta plezuro (kaj kvalito). Lundvespere mi malkovris talenton de Gijomo: liaj tekstoj, lia muziko, lia plenemocia voĉo, lia komunikmaniero kun publiko multe plaĉis al mi.

**Laurent Peuch**

## MES: kie floras mimozoj

Pli ol 70 esperantistoj el Britio, Belgio, Germanio, Hispanio, Nederlando kaj Francio kunvenis 27 feb – 5 mar en la sudfranca urbo Agay okaze de la tradicia Mediteranea Esperanto-Semajno.

La kursoj okazis matene kaj vespere (de la 18a ĝis 19a horoj). La kurson por komencantoj gvidis Rafael Mateos el Hispanio. En la kurso por progresantoj instruis Malcom Jones el Britio, kaj Katalin Kováts, hungarino loĝanta en Nederlando, gvidis kurson altgradan.

Post vespermanĝo okazis distraj vesperoj, lumbildoj, prelegoj, kantado, bildfilmoj k.a. La kroma tempo estis libera. La posttagmeza programo estis interesa, ĉefe promenadoj tra la monteto Esterel gviditaj de kompetenta naturalisto. Dimanĉe ni partoprenis la Florfeston en Agay. Marde posttagmeze en Mentono estis Festivalo de la citronoj.

Konklude, tre bona semajno en Esperantio, kie floras mimozoj.

**Monique Prezioso**

## Naĝejo, promenoj kaj babilado

Dekduo da Esperanto-parolantoj el Germanio kaj Belgio partoprenis en la unua renkontiĝo *Printempe*, kiu okazis 1–6 apr rande de la eta vilaĝo Baasem en la Eifel-regiono, sude de Kolonjo. Fakte nur dek unu homoj parolis Esperanton — ĉeestis kvar infanoj, el kiuj la du beboj ĉefe "suĉis Esperante".

La tempo agrable pasis per multa babilado, ofta vizitado de la endoma naĝejo, promenoj kaj ekskurseto al la apuda Kronenburg. Prezentiĝis pluraj prelegoj kun diskuto, interalie pri la glosaro de Karol Pič, pri Esperanto en EU kaj pri Kelmis/Moresnet. Kvankam la renkontiĝo estis relative malgranda, la partoprenantoj multe ĝuis ĝin kaj esperas reveni sekvajare.

La venontjara *Printempe* okazos verŝajne en la sama regiono, proksime de Belgio kaj Nederlando, dum Pasko kaj ĉirkaŭaj tagoj.

**Lu Wunsch-Rolshoven**




## IJF: Por kultura tutmondiĝo

IJF estas la ĉefa internacia aranĝo de IEJ (Itala Esperanto Junularo), kiu tradicie okazas dum la Paska semajno. Post la deviga pasintjara haltigo, kiam la festivalo estis nuligita pro la tertremo, ĉi-jare ĝi ree iĝis la kutima amuza kaj interesa renkontiĝo, danke al la bonvolemaj organizantoj kaj al la agrablaj partoprenantoj.

La ejo estis en Roncegno, montara urbeto je la norda flanko de la valo Valsugana, en la regiono Trentino. Kiel kutime, partoprenis homoj el malsamaj landoj, junaj aĝe aŭ junaj kore, kiuj renkontiĝis por diskuti la temon "Kultura tutmondiĝo", sed ĉefe por amikumi kaj amuziĝi uzante Esperanton.

La riĉa taga programo konsistis el prelegoj, diskutrondoj, laborgrupoj. Ekzemple, oni pritraktis historiajn, etikajn kaj politikajn aspektojn de Esperanto, kulturajn diferencojn inter Azio kaj Eŭropo, ĝermanparolantajn malplimultojn en Trentino, ktp. Sed okazis ankaŭ pli distraj momentoj: la preparado de sangrio, la diskutrondo pri ĵaluzo, la prelego pri Aikido, tiu pri komiksoj. Ne mankis kurso de Esperanto por komencantoj, nek de la itala lingvo por eksterlandanoj.

Du duontagaj ekskursoj okazis tra la ĉirkaŭaĵoj de Roncegno. Krome, estis proponita tuttaga vizito tra la urboj Vicenza, Bassano del Grappa kaj Marostica.

La vespera programo estis vigligita de la koncertoj de muzikistoj kaj grupoj de malsamaj ĝenroj. Ludis Tomio el *La Perdita Generacio*, *Asorti*, Platano el *La Pafklik*, Kim el *Hotel Desperado*, kaj la gitaristoj Hernan Loza kaj François Stride. Funkciis ankaŭ la bonetosaj noktaj ejoj: trinkejo, diskejo, ludejo kaj gufujo.

Sume, tiu IJF estis sukcesa miksaĵo de amuzo, rilakso, kultura riĉigo kaj lernado.

**Manuela Ronco**

## Daŭriga kurso en Harbino

La 6an de aprilo 2010 en la Yutong-a Instituto (Harbino, Ĉinio) komenciĝis meznivela Esperanto-Kurso por studentoj de Heilongjiang-a Scienc-Teknika Instituto, kiuj lernis Esperanton pasintjare en elementa kurso. Prof. Song Ping gvidas ĉi kurson kun la helpo de Qiao Hui, Liu Ting-ting kaj Gao Wan-chao, kiuj lernis Esperanton antaŭ du jaroj.

**Song Ping**

## La kvina Sabla Printempo

En la ĉeĥa urbo Písek, situanta 100 km sude de la ĉefurbo Prago, 9–11 apr okazis jam la kvinan fojon la Sabla Printempo, tradicie dediĉata al la temo “Esperanto kaj Interreto”. Ĝi estas organizata kunlabore inter Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj E@I kaj per sia koncepto kaj enhavo ĝi estas specifa kompare kun aliaj Esperanto-renkontiĝoj.

La ĉefa celo de la Sabla Printempo estas klerigi kaj praktike trejni esperantistojn por kapabli je laboro kun modernaj informteknologioj kaj kreado de modernaj elektronikaj materialoj por Esperanto-movado.



Grava atingaĵo estas, ke la aranĝo estis jam la trian fojon subvenciita de la gastiganta urbo el ĝia fonduso por evoluigo de la regiona turismo, ĉar inter produktoj de la trejnado estas ankaŭ esperantigo de turismaj materialoj pri Suda Bohemio.

Ĉi-jare kunvenis kvardeko da interesiĝantoj el Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Germanio kaj Francio. Ĉiu povis elekti intensan trejniĝon en tri laborgrupoj: ciferecigo de Esperanto-tekstoj kaj fotaĵoj kaj funkciigo de la interreta Esperanto-datumbazo BRETARO, aldono de Esperanto-subtekstoj kaj voĉaj komentarioj al mallongaj videofilmoj, kaj funkciigo de la nove konceptita retpaĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio: www.esperanto.cz.

Ne mankis ankaŭ komuna prelegserio kaj prezento de laborrezultoj de ĉiuj grupoj, sed restis tempo ankaŭ por vizito de la urbocentro kaj de la ampleksa ekspozicio “Ĉu Esperanto estas morta lingvo?” en la Urba biblioteko kaj por distra vespero.

La programo estis plenŝtopita per novaj informoj kaj ideoj, el kiuj granda parto troviĝas sur instrua kompaktdisko, kiun ĉiu partoprenanto senpage ricevis.

**Pavla Dvořáková**

## Vintraj Tagoj de EAF

Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis 13–14 mar en Jyväskylä, urbo kiu estas konata pro pionira laboro por ekesto de literatura finna lingvo. Jyväskylä havas ankaŭ longan historion kiel la Esperanto-studejo: La Esperanto-klubo de Jyväskylä aranĝis somerajn Esperanto-kursojn dum tridek jaroj.

La finna eldono de la internacia lernolibro de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo* estis prezentita al loka publiko komence de la Tagoj en la biblioteko de Jyväskylä, kie krome dum du semajnoj funkciis priesperanta ekspozicio. Loka ĵurnalisto ĉeestis en la prezentado kaj intervjuis la asocian prezidanton Tuomo Grundström.

La Tagoj komenciĝis per muzika interludo de du lokaj studentinoj, kiuj lernis kelkajn kantojn ankaŭ Esperante. Poste la partoprenantoj aŭskultis kaj diskutis prelegetojn pri la evoluo de la finna lingvo, pri la popollernejoj kaj pri la unua popolinstruista seminario de Jyväskylä. Vigla diskuto ekestis ankaŭ kiam estis tempo memori la famajn Esperanto-kursojn, kiujn multaj ĉeestantoj persone partoprenis.

Antaŭ la vespermanĝo okazis jarkunsido de ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj), kiam Sylvia Hämäläinen estis elektita kiel nova prezidanto de la ligo. Estis aranĝita akcepto por la membroj de Societo Nino Runeberg, kiu estas la subtena societo de EAF samtipe kiel Societo Zamenhof estas por UEA.

La vespero estis gaja kaj amuza. Nia rokmuzika bando *Dolchamar* distris nin multflanke. Ili ricevis helpon de kelkaj partoprenantoj, kiuj prezentis sudlandan serenadon. Kaj post la koncerto tiuj, kiuj ankoraŭ ne estis dormemaj, daŭrigis la kunestadon en la urbo.

Dimanĉmatene okazis la jarkunveno de EAF, kiu elektis la novan estraron: Tuomo Grundström (prezidanto), ordinaraj membroj Päivi Saarinen (vicprezidanto, ĉefdelegito), Tiina Oittinen (sekretario), Paula Niinikorpi (librotenisto), Markku Saastamoinen, Markus Sunela kaj Keith Uber; vicmembroj Robert Bogenschneider, Arvo Karvinen kaj Tiina Kosunen (kasisto).

Sylvia Hämäläinen estis nomumita kiel EAF-aganto de la jaro 2009 pro novigo de la koresponda kurso uzita en distancinstituto ĉe Orivesi.

Plej lasta programero estis ekskurso al roka planetario, kie okazis planetaria prezentado kaj poste lunĉo. La Vintraj Tagoj finiĝis per bonetosa busveturo reen al la urbo. Oni adiaŭis per deziroj de baldaŭa ĝisrevido en printempa ekskurso aranĝata de Jyväskylä-anoj, en la tradicia somera kurso en Valamo kaj en Aŭtunaj tagoj, kiuj okazos en septembro en Estonio kunlabore kun estonoj.

**Tiina Oittinen**

Parto de la novelektita estraro de EAF en la neĝoplena Jyväskylä: Paula Niinikorpi, Robert Bogenschneider, Tuomo Grundström, Päivi Saarinen, Tiina Oittinen, Keith Uber *(Fotis Kari Kettunen)*





## Tradicia Postpaska festo *Rideto*

Ĉiujare la Esperanto-klubo *Ruto* en Šiauliai (Litovio) organizas Postpaskan feston *Rideto*. Ĉi-jare la 10an de aprilo ĉirkaŭ 40 geesperantistoj kaj iliaj infanoj kunvenis okaze de la *Rideto*, dediĉita al Postpasko kaj konatiĝo kun la ĉi-jara kongreslando Kubo.

En la urba kulturdomo, kie troviĝas la klubejo de *Ruto*, oni kunvenis, konatiĝis kaj, post komuna fotado, ekskursis al la Muzeo de Aušra, kie kun helpo de ekskursgvidantino konatiĝis kun la ekspozicio de manfaritaj kurtenoj de litovaj virinoj, ekspozicio de bele diversteknike farbitaj Paskaj ovoj kaj maskoj de la Karnavala Mardo.

La lasta parto de *Rideto* estis amuza "vesperumo" en la ejo de la Konfederacio de la urbaj neregistaraj organizaĵoj, membro de kiu estas nia klubo *Ruto*.

La vesperumon gvidis la prezidanto de *Ruto* Gediminas Kazlauskas kaj lia edzino Reda Kazlauskienė. La ejo estis ornamita per Kubaj flagetoj, diversaj fotoj kun vidaĵoj de naturo kaj vivo de Kubo. La partoprenantoj per diversaj elementoj de siaj vestaĵoj kreis Kuban etoson.

Pri ĉi-jara kongreslando Kubo ni multe ekkonis, partoprenante en la kvizo pri Kubo, kantante en Esperanto la popularan Kuban kanton *Guantanamera*, kaj lernante la Kuban dancon Salsa sub la gvidado de Vida Kulikauskienė el Panevėžys.

Postpaskon ni eksentis, ludante ruladon de Paskaj ovoj, partoprenante en la konkurso de plej bele ornamita Paska ovo, rigardante la Paskajn desegnaĵojn de infanoj.

**Klaudija Margevičienė**

## Esperanto biblioteken

La 9an de aprilo en la Agrikultura Centro de Sant Pau d'Ordal, Barcelona, oni instalis ekspozicion pri Esperantaj libroj: beletro, scienco, biografioj, fabeloj, gramatikoj, vortaroj, ktp.

Vespere de la sama tago, oni okazigis rondan tablon "Konstrui grandan publikan bibliotekon ĉirkaŭ Esperanto". La projekto de la urbestraro estas enmeti en la estontan bibliotekon la historian dokumentaron de la nuna Muzeo — Biblioteko de Sant Pau d'Ordal.

La programon gvidis Núria Solé, kiu prezentas ĉiutage la mondajn noticojn en TV3 (Kataluna Televido).

Unue parolis Rafael Hernández, filo de la iniciatinto de la Esperanta Muzeo-Biblioteko. Li rakontis amuze pri sia patro, kiam li kolektis Esperantajn librojn, revuojn kaj dokumentojn.

Pri lingvistiko paroladis Josep Tubau, kunlaboranto de TV3. Li parolis pri planlingvoj kaj Esperanto.

Lourdes Reyes, ĉefino de la Ĝenerala Publika Direkcio de Bibliotekoj, rakontis pri organizado kaj funkciado de publikaj bibliotekoj.

Laste Ferran Mascarell, eksministro de Kulturo de la Katalunia registaro parolis pri la granda kaj efika laboro de la bibliotekoj por la kultura disvastigado de la popoloj.

**Martí Guerrero**

**La 29an de majo, sabate, la redaktoro de *La Ondo* prelegos pri Zamenhof kadre de la Ruslanda Kongreso en Peterburgo.**

## *Unufraze*

★ Por fondi landan sekcion de la partio EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) en Pollando, estas kolektataj la necesaj mil subskriboj; oni planas fondi ĝin en julio kadre de la Grandpoluja E-Somero apud Poznań. (Www.e-d-e.org)

★ La urbestro de la E-urbo Herzberg Gerhard Walter ricevis la legitimadon kiel oficisto por civilstato; ekde nun geedziĝceremonioj en Eo estas aranĝeblaj en la kavalira salono de la Welf-kastelo. (ICH)

★ De 15 mar ĝis 14 apr 2010 en la urba biblioteko de Písek (Ĉeĥio) funkciis E-ekspozicio sur 23 grandaj paneloj k en 3 librovitrinoj; la ekspozicio, iniciatita de Pavla Dvořáková, poste estos montrata en České Budějovice, Tábor, Milevsko k Klatovy. (ĈEA-retkomunikoj)

★ Post la sukceso de la pasint-aŭtunaj kursoj en Indonezio Heidi Goes planas reveni septembre-oktobre ĉi-jare, al la jam vizititaj urboj k al tiuj urboj kie intertempe oni komencis memlerni Eon, por instrui k eventuale okazigi ekzamenojn. (Heidi Goes)

★ 30 mar 2010 *Brněnská televize* (Brna televido) en sia programo *Vlna z Brna* (Ondo el Brno) dufoje elsendis kvaronhoran intervjuon pri Eo kun Marek Blahuš, vicprezidanto de Ĉeĥa E-Junularo k prezidanto de ties loka klubo en Brno. (Marek Blahuš)

★ En la universitato de Uralsk (Kazaĥstano) studas Eon en du studentaj grupoj, 41 estontaj instruistoj de fremdaj lingvoj; ankoraŭ 11 studentoj de Uralsk studas per Eo turismon en Bydgoszcz. (Majra Baradosova)

★ En la ilustrita enciklopedio pri 1000 plej gravaj momentoj de la historio de Litovio, eldonita okaze de la miljariĝo de Litovio, estas tutpaĝa artikolo pri Eo k Zamenhof. (Povilas Jegorovas)

★ Premiera prezentado de la E-teatraĵo *Dek tagoj de Kapitano Postnikof* okazis 23 mar en Banja Luka en urba teatro "Jazavac" en ĉeesto de ĉ. 200 spektantoj, kiuj povis legi serban tradukon. (Miĉo Vrhovac)

★ La franclingvana laborista asocio SAT-Amikaro en 2009 havis 685 membrojn, kompare kun 688 membroj en 2008. *(La Sago)*

★ Pernambuka E-Asocio, en kunlaboro kun Spiritisma Federacio de Pernambuco (Brazilo), komencis en marto bazan k progresigan kursojn de Eo kun aldono de prelegoj por pli spertaj e-istoj. (BEL Informas)



Dafydd ab Iago jam dek jarojn verkas por LOdE.

## Ĉu Belgio eksplodos?

***Dafydd ab Iago el Bruselo***

Kiel gastiganto de la ĉefurbo de la Eŭropa Unio, Belgio kaj Bruselo havas influon pli fortan, ol oni povintus imagi surbaze nur de la grandeco kaj povo de la lando kaj urbo.

Tiun influon oni vidas eble plej klare en la nombro de gravaj belgaj politikistoj, kiuj okupas postenojn je Eŭropa nivelo, ekzemple: Herman Van Rompuy, la prezidanto de la Konsilio de la Eŭropa Unio, kaj Guy Verhofstadt, la ĉefo de la potenca Liberala partio en la Eŭropa Parlamento. Do, kiam io okazus en Belgio, kaj specife en Bruselo, tio efikus ankaŭ al Eŭropo.

Kio povas okazi? Plej ofte oni pensumadas, kiom longe Belgio daŭros en sia nuna formo. Ĉu Flandrio baldaŭ sendependiĝos? Ĉu Bruselo fariĝos parto de ŝtato kun Valonio. Ĉu la suda nur franclingva Valonio fariĝos parto de Francio? Evidente, la multnacia kaj multlingva ŝtato Belgio ne estas bela ekzemplo de harmonia kunvivado de diversaj popoloj. Eĉ se nur unu homo mortis en la longdaŭra konflikto inter valonoj kaj flandroj — kaj laŭdire tiu mortis pro korinfarkto — Belgio neniam sukcesis en siaj 150 jaroj trovi formulon por sekurigi la harmonian kunvivon de siaj popoloj. La problemoj daŭre iras ĉirkaŭ la sama temo: flandroj spertas la “perdon” de Bruselo kiel ĉefe nederlandlingva urbo kaj daŭran premon de la franca lingvo.

“Ĝis la fino de la dek-naŭa jarcento, Bruselo estis flandra urbo. Kiel en aliaj flandraj urboj, la elito tiam parolis france, sed, malkiel en aliaj urboj, kie la flandra emancipo nuligis la uzadon de la franca lingvo, en Bruselo ĝi plu uzis la francan, kaj finfine la resto de la popolo de la urbo franciĝis”, — notas Filip Van Laenen, flandra aktivulo, kiu nun loĝas en Norvegio.

“Mi ne spertis pli da diferenco inter flandro kaj valono, ol inter du flandroj aŭ inter du valonoj; mi konstatis multe da bonvolemo inter alilingvanoj eĉ neesperantistaj. Tamen, vidate el eksterlande, la interkompreniĝo inter belgoj ne ŝajnas ideala. La kaŭzo de la problemoj estas la miskono de la faktoj kaj la misinformado de la amaskomunikiloj”, — pensas esperantisto Raymond Gerard. Laŭ li, la flandraj separatismaj partioj esperas, ke, kiam la belga ŝtato ne plu estos regebla, la regionoj mem devos transpreni la kompetentojn, kiuj ne plu estos plenumeblaj de la mortanta ŝtato. “Flandrio provos alproprigi ĉiujn povojn de la ŝtato kaj pruvi, ke la regiono mem kapablas pluevolui sen la balasto de la malriĉa Sudo. La arte difinita lingva limo inter Flandrio kaj Valonio iĝos fakta ŝtata limo”, — aldonas Gerard.

Eĉ ene de belga Esperantujo, komunikado kaj kunagado malfacilas inter flandraj kaj franclingvaj esperantistoj (krom en Bruselo). “Iritas min, ke en Belgio la Esperanto-agado estas organizita per lingvo. Mi bedaŭras tion”, — plendis franclingva esperantisto en belga Esperanto-forumo. Ene de la flandra movado oni klarigas la mankon de kunagado per praktikaj kialoj, ekzemple, la bezono je subvencioj de la flandra regiono (ankaŭ por dungito) aŭ la distanco inter la sidejo de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kaj la agadoj de valonaj esperantistoj en urboj kiel Liège, Namur kaj Louvain-La-Neuve. Eĉ Bruselo ŝajnas malproksima loko. “Se FEL ne atentus la regulojn de la Flandra Komunumo, ĝi devus tuj fermi la centron kaj ne plu povus pensi pri iu profesia aktiveco”, — rimarkis FEL-estrarano en ret-debato.

Se belgaj esperantistoj — kun komuna lingvo Esperanto — ne povas efike interkomunikiĝi kaj kunagadi, kiajn ŝancojn havas neesperantistoj en la multlingva lando? Laŭ multaj flandroj la nura solvo estas sendependeco de Flandrio. Unu el la kialoj por la daŭrigo de la belga ŝtato, krom ebla volo kunvivi aŭ almenaŭ ne sendependiĝi, estas ke Flandrio ne aŭtomate fariĝus membro de la Eŭropa Unio. En 2004 la tiama prezidanto de la Eŭropa Komisiono Romano Prodi klare diris, ke regiono, kiu fariĝus sendependa de membro-ŝtato, devos fari peton por fariĝi membro. La nuna prezidanto de la Komisiono, José Manuel Barroso ne estas tiom certa pri la afero. “Ĉi tiu demando tuŝas multajn aferojn, kiuj rilatas al la internacia juro. Ne estas kutimo de la Komisiono doni opinion pri kazoj, kiuj estas teoriaj”, — diris Barroso.

Ĉiuokaze, Belgio frontas seriozajn problemojn. Eksĉefministro nun vane provas trovi solvon por unu el la plej grandaj demandoj. Kio devas okazi kun la komunumoj ĉirkaŭ Bruselo, kie franclingvanoj dum la lastaj jaroj fariĝis plimulto. Ĉu ili devos esti eltranĉitaj el Flandrio kaj fariĝi parto de Bruselo? Preskaŭ ĉiuj flandraj politikistoj rifuzas tion. Franclingvaj politikistoj, tamen, rifuzas agnoski ke la franclingvaj enloĝantoj loĝas en Flandrio.

Bruselo – la ĉefurbo ne nur de Eŭropo, sed ankaŭ de ĉiam pli disa lando *(Eŭropa Komisiono)*



## Francoj luktas kontraŭ la angla

Por forigi anglismojn el sia lingvo, en Francio oni starigis konkurson pri la plej bonaj francaj ekvivalentoj por angla-devenaj komputilaj vortoj kiel “chat” (babilejo), “tuning” (agordado), “buzz” (klaĉo), “newsletter” (novaĵletero) kaj “talk” (parolo).

La anglaj vortoj, kiuj eniras en aliajn eŭropajn lingvojn, laste precipe per la interreto, timigas plurajn registarojn kaj lingvosciencistojn. La franca, tradicia ĉeflingvo de diplomatio, luktas kontraŭ la angla kaj en internaciaj rilatoj, kaj hejme. La ministro de eksterlandaj aferoj Alain Joyandet invitis studentojn al helpo — ili proponu taŭgajn francajn ekvivalentojn.

Ĉiujn proponojn prijuĝis komisiono, konsistanta el membroj de la Franca Akademio, francaj politikistoj kaj la populara franca hiphopa kantisto MC Solaar.

Fantazio al la konkursantoj vere ne mankis, ĉar, ekz-e, anstataŭ vorto “chat” oni proponis “e-blabla” aŭ “tchatche”. Tiuj tamen ne plaĉis al la akademia komisiono, kiu preferis la vorton “dialogue”. Aliaj elektitaj tradukoj estas “buzz” kiel “ramdam”, “newsletter” kiel “infolettre” kaj “talk” kiel “débat”.

Se la neologismoj ekplaĉos al homoj, ili eniros la oficialajn vortarojn kaj ĉiuj francaj ŝtataj dungitoj devige uzos ilin, por influi la publikan lingvouzon.

Por ilustri ke la batalo ne estas vana, la ministro mencias la vortojn “walkman” kaj “software”, kiujn dum dek jaroj oni komplete anstataŭigis per “baladeur” kaj “logiciel”.

## Amasa instalado de programoj



Ĉu vi estas uzanto de Vindozo kaj ne ŝatas perdi tempon serĉante kaj instalante programojn kaj pelilojn (“drivers”) por via nova komputilo? Aŭ vi serĉas senpagajn alternativojn por iuj pagendaj programoj? Ambaŭ problemojn celas solvi retaj projektoj FreeApp kaj Ninite.

FreeApp (www.freenew.net) ofertas riĉan kolekton de senpagaj programoj. Sufiĉas elekti kiujn vi volas kaj elŝuti unuopan instalilon, kiu jam prizorgos ĉion. La administranto asertas, ke ĉiuj programoj estas sen virusoj, reklamo kaj similaj ĝenaĵoj.

Eblas elekti el 15 kategorioj, inter kiuj ne mankas retumiloj, tujmesaĝiloj, oficeja programaro, sekurecaj iloj, KD- kaj DVD-registraj programoj aŭ ludiloj de muziko kaj video.

Simila servo estas Ninite (www.ninite.com). Ankaŭ tie oni elektu programojn laŭ sia intereso kaj poste klaku sur butonon. Ilia instalado estas plene aŭtomata, sen neceso de iu ajn interveno de la uzanto. La kompanio konfirmis, ke la instaliloj de unuopaj programoj estas elŝutataj rekte el la paĝaroj de la kreintoj.

Servoj kiel tiuj ĉi jam delonge estas parto de la operaciumo Linukso, sed la uzantoj de Vindozo ĝis nun devis aŭ kontentiĝi kun defaŭlta propono de la sistemo, aŭ pene serĉi mem.

**Katarína Nosková, Marek Blahuš**

## Niaj literoj por la ruslandanoj

La 31an de marto estis finkompilita la libere distribuata tiparo PT Sans, farita de la firmao *ParaType* per mendo de la Ruslanda registaro. Ĉi-foje ĝi enhavas Esperantajn literojn.

Celita al cirilskribaj lingvoj de Ruslando, la bone ellaborita senserifa tiparo tamen ne subtenis plurajn latinajn simbolojn, kiujn la firmao planis vendi en la komerca versio de la tiparo. Elpaŝo de ruslandaj esperantistoj kaj de la landa asocio REU oficiale ebligis eneston de la Esperantaj literoj ankaŭ en la baza tiparo, al kio esperantistoj jam alkutimiĝis en aliaj popularaj tiparoj.

[PT Sans]

Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo *Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo*

**Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo** ***Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo***

[PT Sans Caption]

Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo **Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo**

[PT Sans Narrow]

Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo **Ĉiuĵaŭda ĥorŝanĝo**

Antaŭe temis pri eventuala pago al *ParaType* por enesto de niaj unikaj literoj en la tiparo, sed poste la firmao ŝanĝis sian planon kaj decidis enmetis la literojn senpage, interalie pro la aktiva partopreno de esperantistoj (Vjaĉeslav Ivanov, Sergej Andrejsons, Maksim Griŝin) en diskonigo de la nova tiparo kaj en respondado al la “plej oftaj demandoj” diversloke en Interreto.

La novan tiparon oni elŝuti kaj ekuzu: http://fonts.ru/public/

PT Sans Caption bone taŭgas, interalie, por diversaj vojmontriloj kaj surpordaj ŝildoj. La “venko” ne aspektus grava, se ne estus alta la statuso de la priparolata tiparo. Ĝi estas la unua senpaga libere distribuata ŝtate financita tiparo kun plena subteno de ĉiuj alfabetoj de la Ruslandaj cirilskribaj lingvoj. Ege gravas ke en tiaspeca tiparo estu Esperantaj literoj, samkiel ĉiam estis antaŭe pri popularaj tiparoj.

**Vjaĉeslav Ivanov**

26 mar 2010 forpasis en Budapeŝto

**d-ro Ferenc Jáki (1919–2010)**

doktoro pri klasika filologio. Esperantisto ekde 1961, diplomita Esperanto-instruisto (1965), kuniniciatinto de la leĝo pri Esperanto kiel elektebla studobjekto en hungaraj lernejoj kaj prezidanto de Ŝtata Ekzamenkomisiono (1967–2008), plurfoja komitatano kaj estrarano de HEA, Honora Membro de UEA (1992), Kavaliro de la Hungara Kulturo (1999).

26 mar 2010 en Roma malsanulejo forpasis

**Maŭro La Torre (1946–2010)**

doktoro pri matematika lingvistiko, profesoro ĉe la 3a Roma Universitato, aŭtoro de pluraj fakaj verkoj. Esperantisto ekde 1962, membro de AIS kaj de la Akademio de Esperanto, prezidinto de ILEI. En 1998 li iniciatis la projekton *Interkulturo* pro kiu li ricevis la titolon *La Esperantisto de la Jaro 2000.*

8 apr 2010 en Alma (Kebekio) forpasis

**Higinio García Gómez-Quintero (1939-2010).**


Naskita en Francio, li ekloĝis en 1963 en Kanado kie li instruis klasikajn lingvojn, filozofion kaj teologion. Esperantisto ekde 1955 li kunlaboris en pluraj gazetoj, redaktis franclingvan bultenon *Aujourd'hui l'espéranto*, liaj noveloj aperis en la kolektivaj kolektoj *Tempo fuĝas* (1995) kaj *Mondoj* (2001) kaj en lia propra novelaro *Kapturnoj* (1999).

***Ni funebras kaj kondolencas.***

## Malmulte pri la verko

Pri la recenzo de Reinhard Haupenthal en *La Ondo* 2010, №4.

La fakto, ke Reinhard Haupenthal sendube havas meritojn ĉe la starigo de tradicio de festlibroj en Esperanto, verŝajne malhelpis lin simple akcepti kaj dece aprezi verkojn de aliaj. Mi vere admiras, kiel per mikso de ignoroj, distordoj, ofendoj kaj aliaj impertinentaĵoj li kuraĝas pritaksi libron, al kiu kontribuis 106 personoj. Multaj, kiuj konas la recenzinton kaj liajn kondutojn, ne aparte miros pri la teksto. Kiel unu el la redaktintoj mi tamen permesas al mi jenajn rimarkojn:




1. En la enkonduko ni redaktoroj klarigis, kial tiu ĉi libro estas ligita al nur unu kampo de la ampleksa aktivado de Humphrey Tonkin, al Esperanto kaj la Esperanto-movado. Pri la aliaj kampoj ni ne kompetentas kaj ne estus havintaj aliron al la koncernaj fakuloj. Do la "movadaj dimensioj" estis tute intencitaj.

2. Per siaj juĝoj pri la personoj Tonkin, Daŝgupta kaj aliaj Haupenthal sin mem karakterizas. Ne necesas komenti.

3. Eble Haupenthal ne rimarkis, ke ja ekzistas diversaj difinoj de la objekto de interlingvistiko, ne nur tiu kiel planlingvo-scienco. Pro tio la teksto de Vergara estas ĝuste lokita.

4. Pri GIL (germana mallongigo por Societo pri Interlingvistiko) la recenzinto misinformas. Al enirkriterioj apartenas ne nur la faka kvalifiko sed ankaŭ la kapablo ĝentile kaj senkonflikte kunlabori kun aliaj kolegoj. Ĉar Haupenthal disponas pri la arto labori malkunige, la estraro de GIL malakceptis lian aliĝpeton. Lia recenzo montras la ĝustecon de tiu decido.

5. La kontribuo de Wera Blanke en la prilaborita esperantlingva versio antaŭe nenie aperis, sed ja kiel germanaj variantoj, destinitaj tamen por komplete aliaj celgrupoj.

6. Ne klaras, kion la bibliografo Haupenthal havas kontraŭ bibliografioj, ekz. ĉe Wandel kaj Chrdle. Kulpas mi, kiu petis kiom eble plej kompletajn informojn. Krome, referencoj al la Interreto (i.a. teksto de Barandovská-Frank) nuntempe estas tute kutimaj, kion Haupenthal devus scii.

7. Ĉar la recenzinto, lige al la brila intervjuo de Fettes kun Tonkin, mencias terminon uzitan de Carlevaro, mi atentigas por la kazo de eventuala bezono, ke la sviso estas psikiatro…

8. Bele, ke tiu evidente senvalora libro, en kiu Haupenthal por si trovis nur 5 interesajn tekstojn, tamen manku "en neniu ŝranko". Granda honoro! Kiel dankon ni eble redaktu por li broŝuron kun lia tute persona magra elekto.

**Detlev Blanke** (Germanio)

RADIO

ESPERANTO
Radio Esperanto
*Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado*
**Podkasta servo de *La Ondo***
**Aŭskultu:** http://la-ondo.rpod.ru

## Pri festlibroj

Al Esperantujo mankas klaĉĵurnalo. Io kiel *Krokodil* aŭ *Bild*, kiuj el malgrandaĵoj faras skandalojn. La skandaluloj tiamaniere famiĝas kaj ĉiuj volas scii pri ili iom pli. Bonŝance ni havas *La Kancerklinikon* (dankon, Ĵak!), eĉ *Heroldo* dum lastaj jaroj sukcese privenenas la movadon, kaj ni havas la fenomenon Haupenthal. Tiu sinjoro estas sendube klera kaj inteligenta, liaj fakaj laboraĵoj estas altnivelaj. Mia edzo, kiu konis lin persone, iam diris al mi: "Sentu vin flatata, se Haupenthal kritikas viajn verkojn. Tio signifas, ke li legis ilin. Stultaĵojn li eĉ ne legus".

Kvankam Haupenthal mem meritplene lanĉis la sciencan ĝenron de festlibro en Esperantujo, li ne troviĝas inter cento da aŭtoroj de la festlibro por Tonkin. Kial? Evidente por povi ĝin kritiki objektive, neparolante "pro domo" (aĥ, Dallmayr!). En klaĉĵurnaloj kutime kaŝiĝas grajno da vero. Haupenthal ja ne malpravas. Kiel redaktorino mi daŭre spertas, ke sciencaj aŭtoroj havas siajn preferatajn temojn, same kiel oni havas sian preferatan bieron. Oni ŝatas ĉiam ŝovi manon en la saman tirkeston, same kiel en la saman bierkeston. Kial tio estu malbona? La samo validas por hobioj: ŝekspirologia profesoro ŝatas sian Esperanto-movadon, gimnazia instruisto sian volapukologion, habilitita ĝermanisto sian GIL-on. Kial ne? Cetere, laŭ la supra tezo de mia edzo estas GIL prestiĝa organizo, se sinjoro Haupenthal klopodis membriĝi en ĝi. Li devintus misplaĉi ne nur al Blanke, sed al la tuta estraro kaj al kvardeko da membroj, kiuj ĉeestis la ĝeneralan kunsidon. *Quel malheur.* Oni ne akceptis konatan scienciston, kiu ricevis la festlibron jam por sia kvindekjariĝo, kvankam — kiel li mem klarigas — oni kutime ricevas ĝin plej frue en la aĝo de sesdek. Li naskiĝis 1945, lia festlibro aperis 1998. Ĉu? (Mi ĉiam havis malbonajn notojn en matematiko.)

Mi ne volas sublupeigi la tutan recenzon. Amuzis min la rimarko pri narcisismo. Kial oni ne ŝatu sin mem? Sciu: mi sesdekjariĝos en 2012 kaj iu festlibreto tute ne malplaĉus al mi! Tio estos post du jaroj (ĉu mi kalkulas ĝuste?), do mankos nek tempo, nek trankvilo. Kaj krome mi havas nenion kontraŭ revarmigita gulaŝo. Oni nur aldonu iom da rozmareno, iom da oregano, kaj, se oni ŝatas, eĉ iom da pipro.

**Věra Barandovská-Frank** (Germanio)

## Ĉu nur kvin el pli ol cent?

Fine de la grandparte negativtona recenzo *Malpli estintus pli*, de Reinhard Haupenthal, pri *La arto labori kune* (en la aprila numero de LOdE, p. 17–18), surprizis min jenaj vortoj kontraste sufiĉe pozitivaj:

Se tion oni ignoras, restas bela kvanto da atentindaj kaj legindaj artikoloj kiuj gardos aktualon kaj malbanalon. Ili konsistigas la veran valoron sub la stuko. […] En neniu ŝranko ĝi manku.

Bedaŭrinde la recenzinto ne donas pli konkretajn informojn pri tiuj artikoloj legindaj kaj atentindaj, krom ke


Persone mi legis kun plezuro kaj profito la artikolojn de Chengtai (pri Elpin), Huĝimoto (pri Takasugi Itirô), Lins (pri komunistaj esperantistoj), Minnaja (pri lingvo-kontrolaj institucioj) kaj Ragnarsson (pri la Shakespeare-tradukoj de Tonkin).

Ĉu do la bela kvanto konsistas je nur 5 kontribuoj el tuta sumo de pli ol 100?

**Jorge Camacho** (Hispanujo-Tajvano)

# Fandi kaj gisi

## *Studo de Sergio Pokrovskij*



### La abstrakta kaj la plursenca

Tre plaĉas al mi la vorto *skribilo.* Ĝi estas tre abstrakta, kaj en praktika komunikado povas anstataŭi dekon da pli precizaj vortoj (krajono, plumo, kreto, grifelo, peniko ktp), kiuj jes estas iam bezonataj, sed nur malofte. Tiaj abstraktaj vortoj faciligas la lernadon, kaj ebligas malfremdigi alicivilizajn realaĵojn (por eŭropano ne tuj evidentas ke peniko povas funkcii kiel normala skribilo en la tradicia kaligrafio ĉina).

Estas do tre natura ke la esperantistoj, komencante per Zamenhofo mem, ĉiam ŝatis tiajn abstraktajn vortojn. Tamen oni ne ĉiam konsciis, ke estas diferenco inter koncepte pura supernocio kaj vorto plursenca.

Por rusa lernanto estas iom ĝena, ke la vorto *bona* konfuzas la malsamajn konceptojn *благой, хороший* (bona vetero, bona novaĵo, bona fakulo) kaj *добрый* (bonkora). La dua estas subnocio de la unua — tamen ja aparta nocio, samnivela kiel *bela, justa, honesta, kompetenta, sana* ktp.

Tio estas falsa ŝparo, kaj ĝi havas sian koston. Tutegale oni bezonas vorton por *добрый* — kaj sekve oni kreas nelogikan kaj aparte lernendan idiomaĵon *bonkora*[1]. Paginte la prezon de la dua vorto, ni tamen nur duone solvis la problemon: ni jes povas neprigi la sencon *bonkora*, sed *bona* plu restas dusenca. Ni plu havas tiun malkoheron, ke

*bona avo* probable estas *bonkora*; sed
*bona patrino* probable celas la alian sencon,
*bona knabo* probable celas knabon bonkondutan

ktp.

Ankaŭ la antonimoj estas malsamaj: la malo de *bonkora* estas *malica*, la *malbona vicpatrino* ne taŭgas por esprimi la ideon *malica vicpatrino.* Do, *bona* estas same malbona kiel *olda*, kiu konfuzas la ideojn *malnova* kaj *maljuna.* “La bono” ne signifas “bonkoreco”n (kaj simetrie esceptaj estas la francaj “bonté” kaj “le bien”).

Tamen tiu mallogikaĵo estas pravigebla per la granda internacieco de la konfuzo; kaj malgraŭ la estetika malplezuro pri la mallogikeco, tiu konfuzo ne kreas grandajn malfacilaĵojn por la rusoj. Dum la esperantistoj de alilingva deveno probable ĝin simple ne rimarkas.

### La senco de “fandi” ĉe Zamenhofo

Post la ĵusa enkonduka ekskurso ni transiru al la ĉeftemo de nia studo: la vorto *fandi.* La *Universala vortaro* ĝin jene difinas:

**fand’**
(fr) fondre
(en) melt, cast
(de) giessen, schmelzen
(ru) топить, растоплять
(pl) roztapiać

La tradukoj germana kaj angla malimplice atribuas al ĉi tiu verbo po du malsamajn signifojn:

1. likvigi; kaj
2. gisi, muldi per fandado.

La traduko franca estas unu, sed per verbo konfuzanta tiujn du signifojn. La tradukoj rusaj kaj pola donas nur la sencon *likvigi*, sen malpleja aludo al formodona gisado.

Do, Zamenhofo intencis ŝpari radikon laŭ la konfuza modelo franca: tion pruvas la germana traduko *gießen.* Kvankam li ankoraŭ iom hezitis, kion pruvas la okulfrapa malesto de la gisa senco en la tradukoj rusa kaj pola.

Tamen praktike uzata lingvo ne povas funkcii sen rimedo por solvi tian konfuzon; do, ankaŭ la franca posedas terminojn *couler, jeter dans le moule* por la gisa senco (eble Zamenhofo tion ne sciis).

Malgraŭ ĉi tiuj malestoj kaj hezito, oni trovas tiasencajn uzojn en lia verkaro. Ekz-e

> ili faris al si fanditan bovidon kaj adorkliniĝis al ĝi [Eliro, 32:8]

Por kompreni la strangan dusencecon de la verboj franca kaj esperanta necesas reveni al Latino. La etimo *fundo, fundere* signifas *verŝi* — kaj pli ĝenerale **fluigi**:

*lacrimas fundere* — verŝi larmojn
*aes fundere* — fluigi (likvige fandi) kupron
*glandes fundere* — verŝi (gisi) kuglojn

La metonimio *verŝi* por la formodona signifo estas tre internacia — ĝin uzas la lingvoj germana, ĉiuj slavaj, latinidaj (interalie la franca *couler*) … Formon donas ne likvigo

(ĝi la formojn neniigas), sed verŝado en la muldilon. Tamen ĝuste ĉi tiun verŝan sencon la verbo *fandi* malhavas ("fandi larmojn" normale ne eblas), ĝia ĉefsenco estas likvigo. La plursenceco de la verbo latina estas maloportuna — sed almenaŭ ĝia logiko estas komprenebla.

Eĉ kun tiu klarigo la ambiguo estas ĝena, ĉar la du signifoj de la verbo prezentas kontraŭojn:

fandi statuon = *malkrei*, likvigi statuon;
fandi statuon = *krei*, gisi statuon

Ekz-e *la fandita bovido* ĉi-supre — kaj la detrua fandado jene:

> unu posttagmezon tondro (t.e. fulmo — S.P) fandis sur Kapitolo bronzan statuon de Cereso [H. Sienkewicz, tr. Lidia Zamenhof: *Quo vadis*, ĉap. 58[a]].

Por akiri favoron de siaj dioj *la romanoj fandis* iliajn *orajn statuojn.*

Por pagi tributon al la vandaloj *la romanoj fandis orajn statuojn* de siaj dioj.

Kaj jen konfuzo inter likvigo kaj glaciigo:

> De la spiro de Dio venas frosto,
> Kaj vasta akvo fariĝas kvazaŭ fandaĵo
> [Ijob, 37:10]

Fojfoje Zamenhofon tiu ambiguo ĝenis kaj li provis ĝin eviti uzante *elfandi* por la mulda senco:

> cent kikaroj da arĝento estis uzitaj por elfandi la bazojn de la sanktejo kaj la bazojn de la kurteno [Eliro, 38:27].

La intenco de tiu derivaĵo estis simila al tiu de *eltondi, eltondaĵo*; tamen la analogio estas falsa, ĉar ne la likvigo estas la formodona ago, sed enmuldiligo. Kaj la natura signifo por *elfandi*, konforma al la interna logiko de Esperanto, estas *ekstrakti per fandado* (elfandi feron el erco, plumbon el alojo ktp — *elfandi* estas la logika kontraŭo de *kunfandi*); tia signifo estas fakte atestita en la lingvo, ekz-e

> ekzistas ankaŭ kiuj opinias, ke nun ĝi (la Eklezio — S.P.) estu ĵetita en fornon, por ke la pura oro estu elfandita.[2]

Ĉi tiu estas tria signifo de la Zamenhofa *fandi* kaj de la franca *fondre* (ruse por ĝi ekzistas apartaj verboj *выплавить, вытопить*, la germana havas *ausschmelzen* kaj *verhütten*):

> vane fandis la fandisto: la malbonuloj ne apartiĝis [Jer 6:29]
>
> плавильщик плавил напрасно, ибо злые не отделились
>
> in vain hath a refiner refined, the wicked have not been drawn away

Atentindas ke la vorto *fandisto* en la Zamenhofa uzo indikas du malsamajn metiojn (ruse *плавильщик* kaj *литейщик*).

## La verbo "gisi"

Male ol pri la dusenca "bona", la trisenca konfuzo en "fandi" estas neinternacia. Tial sufiĉe frue oni ekuzis apartan vorton *gisi* (laŭ la germana *gießen*) por la senco

> Fari objekton el fandebla materialo (metalo, vakso, vitro ktp), verŝante likvan fanditan substancon en malplenan ujon, kaj lasante ĝin tie solidiĝi kaj akcepti la formon de tiu muldilo:
>
> *gisi statuon, kanonon, sonorilon; gisita krado* ktp

La solvo estas perfekta; tamen la francaj aŭtoroj de PV ĝin ne komprenis, kaj difinis la verbon *gisi* maltrafe:

> **gisi** [Teĥniko]. Fandfari, elfandi feron, verŝante (!) ferminaĵon kun karbo en specialajn fornegojn.

Per si mem la verbo *fandfari* ne estas klara; ĝi eble povus esprimi ion per konvencio, sed fakte ĝi ne estas uzata, kaj sekve nenion klarigas en la difino. La posta teksto difinas la trian sencon de *fandi* (la ekstraktan), tute malakorde kun la germana etimo kaj la intenco de ĉi tiu prunto.

En tiu misdifino interesa estas la vorto *elfandi.* Evidente, la PV-aŭtoro ne scipovis la germanan, kaj serĉis klarigon; probable la klarigo estis "fandfari, elfandi" — en kiu la vorto *elfandi* celis la Zamenhofan sencon de mulda *elfandi*; sed ĝin la PV-aŭtoro miskomprenis laŭ la lingva logiko en la senco ekstrakta, kaj kompletigis la difinon tiusence.

Rezultas absurdo: por apartigi la sencon *schmelzen* (aŭ pli speciale, *verhütten*) disde la senco *gießen*, PV rekomendas esprimi la unuan per adaptita sonformo de la dua…

Krome, interesa estas la vorto *verŝante* aplikita al ŝuteblaj substancoj solidaj. Probable ankaŭ tiu misuzo estas senkonscia tributo al la prasignifo germana. Ankaŭ poste, en la difino de **gisado**, la ekzemploj ŝajnas rilati al la specoj de muldiloj, do ne al *Verhüttung* sed al *Gießen*: "seksabla, verdsabla gisado; tera gisado".

La ĝustan sencon de *gisi* prezentas la vortaro esperanta-franca de Varingjeno[3] kaj multaj aliaj tradukvortaroj:

**gis/i** fondre (dans un moule), jeter en fonte
**gis|i** vt лить, отливать *(металл)*[4]
**gis/i** cast, found (iron)[5]

ktp. Tiu ĝustasenca *gisi, gisado* troveblas en diversaj tekstoj — en Vikipedio, en revuoj, en romanoj:

> la ordeno (krucista) aparte fieris pri gisado de grandegaj kanonoj [H. Gorecka: *Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando.* LOdE. N-ro 134 (2005:12)]

La precizigon, ke temas pri *metalo* (ruse) aŭ eĉ pli speciale *fero* (angle) oni interpretu ne tro limige, sed kiel ekzemplon indikantan la celatan sencon de verbo nacilingve pli ĝenerala: ruse por la kontrasta senco eblus *verŝi akvon*; angle, *ĵeti rigardon* ktp. En la reala uzo de la esperanta *gisi* (samkiel en la uzo de ĝia germana etimo) oni trovas ankaŭ objektojn gisitajn el bronzo, vitro, plasto, ĉokolado ktp.

## Gisfero

Alia metalurgia termino mankas en la klasika Esperanto: nomo por feraj alojoj entenantaj pli da karbono ol *ŝtalo* (do, pli ol 2%). La rusa lingvo uzas prunton el lingvoj tjurkaj: *чугун*, terminon same simplan (unuradikan) kiel la komplementa termino *ŝtalo.* Pliparto da lingvoj okcidentaj uzas iom nelogikan kunmetaĵon, forme egalan al *gisfero:*

de: Guss/eisen
el: χυτο/σίδηρος
en: cast iron
es: hierro fundido, hierro colado
tr: dökme demir

Gisferon efektive oni plej ofte gisas, samkiel la ŝtalon oni ofte forĝas. La nelogikeco konsistas en tio ke ankaŭ ŝtalon oni povas gisi[6], kaj ke iuj gisferoj estas forĝeblaj. Nu, ne pli malbone ol pri *Ruslando*: ne ĉiuj ruslandanoj estas rusoj, kaj ne ĉiuj rusoj loĝas en Ruslando.

Tamen la franca lingvo nomas tion *fonte* (substantivo responda al *fondre*); la Varingjena vortaro paŭsas tion per

**gisaĵo** (…); fonte (carbure de fer)

Ankaŭ tio povas funkcii per konvencio, samkiel funkcias la egale nelogika *glaciaĵo*. Sed *gisfero* estas malpli mallogika (samkiel la angla *ice-cream* estas malpli malbona ol *glaciaĵo*), ĝi estas pli fidinde komprenebla kaj praktike samlonga. Krome, fakulo povas bezoni ne nur *gisferon* (paŭsantan la germanan *Gusseisen*), sed ankaŭ *gisŝtalon* (respondan al *Gussstahl*)[7]; *gisaĵo* ne kapablas distingi ilin.

Tamen la fakulojn, kiuj esploris la aferon en la jaro 1911[a] sub la aŭspicio de ISAE, ilia terminscienca metodo kondukis al rekomendo ankoraŭ pli fuŝa ol la franca misaĵo. La sekva sekcio entenas iom glatigitan pecon de ilia raporto[8] laŭ la *Terminologia kurso* de J. Werner[9].

## Specimeno pri "giso" el la jaro 1911[a]

**I. Kunigo de la elementoj de la problemo**

**a) Difino**

Bone muldebla alojo de fero kaj karbono (super 2%), akirita per refando de krudfero, gisaj rompitaĵoj kaj ŝtalrubo en fandforno.

**b) Nacilingvaj tradukoj**

(…)

**II. Serĉado de la eblaj solvoj**

**a) Internacia simpla vorto**

ne ekzistas.

**b) Kunmetita vorto komprenebla sen speciala interkonsento aŭ internacia**

La difino donas aŭ "fandita fero" aŭ laŭ la ĥemia formulo "ferkarbido".

**c) Simpla vorto ne tute internacia**

Oni povas memorigi la germanan vorton: "Guss" aŭ "giessen", la italan "ghisa", kaj eĉ la francan "gueuse" (kiu devenas de giessen) alprenante ĉu *giso* ĉu *gizo*.

**d) Kunmetita vorto komprenebla per speciala interkonsento**

La angla vorto donus "fandfero", kiu similas al unu el la germanaj vortoj.

**III. Diskutado**

La serĉata vorto devas eniĝi en multajn kunmetitajn vortojn — speciale en tiujn, kiuj montras ion faritan el tiu metalo; plie ĝi eniras en tekstojn, en kiuj la vortoj "fandi" kaj "fero" estas ofte ripetataj. Sekve estas preferinde, ke elektota vorto ne estu kunmetita. *Giso* estas pli simila al la naciaj prononcmanieroj ol *gizo.*

**IV. Elektata solvo**

Giso.

## Komento pri la komento de Jan Werner

Ĉi-sube la komentoj de J. Werner (JW) aperas en kursivaj alineoj.

JW: *Aŭtoroj de la Konsilaro decidis, ke* gis' *estas substantivo kaj ne verbo. La decido envenis ankaŭ la Plenan ilustritan vortaron (PIV).*

Atentindas ke ili elektis etimologie verban radikon por substantiva signifo. Kial ili ne prenis malpli malkonvenan *guso* (laŭ la germana *Guss* kaj la portugala *gusa*)? Supozeble ĉar la germandevena verbo *gisi* jam funkciis en la lingvo, kaj ili preferis ĝin misuzi (ne komprenante ke *gießen, das Gießen* temas pri la alia signifo de *fondre, fonte*) ol krei taŭgan terminon.

Kvankam la raporto estas eldonita en Dresdeno, mi havas la impreson ke ĝin verkis franco, pensanta per la vortoj *fondre, fonte*, kaj trudanta ilian plursignifecon al la germana etimo de *gis-*. Simetrie okazis pri *facila* (el la france pli preciza *facile*), al kiu oni iam atribuas kromsignifojn de la germana *leicht* aŭ de la rusa *лёгкий.*

JW: *Mi vidas la decidon ĝusta, ĉar ni ne bezonas la verbon* gisi *ekvivalentan al la germana "gießen". Ni ja havas* verŝi *kaj ankaŭ* muldi *(PIV: oni ... muldas objektojn el giso).*

En Esperanto maleblas diri "verŝi statuon"; kaj "muldi ŝlosilon" estas alia afero ol "gisi ŝlosilon".

La vorto *muldi* estas interesa. Unuflanke, ĝi estas bona abstrakta supernocio, kiajn mi laŭdis komence de la studo: temas pri formado laŭ modelo, kaj la gisado estas speciala okazo, kiam oni formas per fandado kaj verŝado en formujon. Tamen *muldado* kovras ankaŭ aliajn specojn de moligo kaj solidigo: eblas muldi per stampado, per sekigo ktp. PIV konas bakmuldilojn por pano, sablomuldilojn por la



Pli ol ducent jarojn en la gisuzino en la Urala urbo Kasli oni gisas belajn artaĵojn.

infanaj ludoj; oni povas muldi fromaĝon aŭ feltajn ĉapelojn; PIV hezitas inter *muldokartono* kaj *papermaĉaĵo.*

Aliflanke, *muldi* estas same aĉa, kiel *fandi*, ĉar ĝi konfuzas la signifojn *fari formujon* kaj *apliki formujon.* "Gisi statuon" estas klara; "muldi statuon" estas ambigua. Kuracisto muldas la makzelon de paciento per gipsosimila pasto, kaj lia teĥnikisto muldas dentoprotezon el metalo aŭ plasto. Estas du malsamaj "muldas", kiujn en la pli precizema lingvo rusa oni esprimas malsame.

JW: *Estas bezone, ke planlingvo estu malpli polisemia ol la lingvoj naciaj.*

Estas mirinda ke ĉeĥlingvano ne rimarkas la ĝenan *polisemion* de *fandi = tavit + slévat*, de *fandisto* kiu estas *tavič* aŭ *slevač.* Ĝuste per **fandi** Esperanto estas *pli polisemia* ol la rusa, ĉeĥa aŭ germana.

JW: *PIV eĉ ne mencias la verbon* gisi, *kvankam ni povus ĝin iel difini.*

PIV2 ĝin difinis (egaligante al *fandi*). Laŭ la Fundamento ni havis

**fandi** gießen, schmelzen

Kaj vortaro ĉeĥa-esperanta difinas:

**gisi** tavit, slévat

(la samaj du sencoj en la inversa ordo). Du vortoj por du sencoj kaj ambaŭ dusencaj.

JW: *Kelkaj fakuloj nuntempe agas laŭ modelo de la germana lingvo kaj aplikas* gisi *kaj* gisfero *kontraŭ la plurjardeka uzanco kaj kontraŭ la nepreterlasinda kodifa influo de PV kaj PIV, malstabiligante la terminaron, sen iu grava motivo.*

1. La motivo estas tre grava, kaj mi jam sufiĉe pri tio parolis.

2. La *plurjardeka uzanco* ŝajnas unueca nur se oni PV-PIVe ignoras la realon.

3. Malgravaj estas la objĵetoj kontraŭ *gisfero*, kiu jes estas iom kritikinda (sed malpli ol multaj nelogikaĵoj similaj al *bonkora*), — tamen havas por si sian grandan internaciecon[10].

PV kaj PIV pretendas esti plenaj priskribaj vortaroj de Esperanto. Fakte ili prisilentas tiun realan uzon kiu estas pli racia ol la de ili trudata leksika maskobalo. Kaj ĉar tiuj vortaroj ĝuas iom pli grandan aŭtoritatan ol ili meritas, tiu trudita *qui pro quo* efektive estigis konfuzon pri la etimologie klara radiko *gis-.*

Menciindas, ke Varingjeno, ĉefredankinte PIV-on, ne ŝanĝis sian racian difinon de *gisi* en la post-PIV-a korektita eldono de sia vortaro franca-esperanta (1976). Eble preteratento — sed ankaŭ eblas, ke la PIV-an misdifinon trudis fakredaktisto, pri kies decido Varingjeno persone malkonsentis. Samkiel malkonsentas aliaj fakuloj pri metalurgio[11], la esperanta Vikipedio ktp.

## Konkludo

La racia solvo estas tre simpla kaj reale praktikata:

**fandi** = *de* schmelzen; *ru* топить, плавить

**elfandi** = *de* verhütten, ausschmelzen; *ru* вытопить, выплавить

**kunfandi** = *de* zusammenschmelzen; *ru* сплавить

**fandisto** = de Schmelzer; ru плавильщик

**gisi** (el metalo, vakso, vitro, plasto…) = *de* gießen; *ru* лить, отлить

**gisaĵo** = io ajn gisita (el metalo, vakso, vitro, plasto…)

**gisisto** = *de* Gießer; *ru* литейщик

**gisfero** = *de* Gusseisen; *ru* чугун

**krudfero** = *de* Roheisen; *ru* передельный чугун

Tiu sistemo mankas en la PIV-oj — sed tio estas difekto de la PIV-oj, kies pretendo esti plenaj priskribaj vortaroj estas ĉi-okaze malvera. Tia sistemo ekzistas en la literaturo kaj en tradukvortaroj (ekz-e en la vortaroj de Bokarev).

En tiu sistemo la plej tikla punkto estas la arkaikigo de la tradukoj *cast, giessen*, kiujn UV donas por *fandi.* Tamen tia arkaikigo ne estus senprecedenca; kaj ĝi eĉ havas apogon en UV mem, ĉar la tradukoj rusa kaj pola la arkaikigendajn signifojn neniam entenis. Eĉ pli ol tio, en la angla parto de la "Akademiaj korektoj de la Universala vortaro" (1914) la radiko *fand* perdis la tradukon *cast* (= gisi), koherigante ĝin kun la tradukoj rusaj kaj pola:

**fand|**

melt, smelt *(vb.)*

La Akademio tamen ne finis sian laboron, ĉar en la germana parto la malkohera traduko "giessen" restas netuŝita.

## Notoj

1. La vorto *bonkora* estas bazita sur la atavisma ideo ke la koro estas la sidejo de la animo, la ideo komuna al la mediteranea kultura rondo. Ĝi estas evidente malvera; kaj en alia kultura rondo oni povas havi alian ideon; ekz-e dum la eŭropanoj sin mortigas ponardante sian koron, la japanoj liberigas la animon tranĉante sian ventron (cetere, ankaŭ la angloj kaj francoj havas similan ideon pri la intestoj: *a man with plenty of guts; il a pour cet enfant des entrailles de père*). Do, en alia kultura rondo oni eble preferus esprimi la bonkorecon per grando de la ventro (la dikaj homoj havas la reputacion esti bon[kor]aj). En tia alia kultura rondo *bonkora* estus ne pli trafa por la koncerna signifo, ol *bonhepata* por la eŭropa.

2. M. Von Galli: *Nova pensado.* "Espero katolika", 1965, n-ro 3.

3. G. Waringhien: *Grand dictionnaire Espéranto-Français.* Paris: SAT, 1976.

4. Бокарев Е.А. *Эсперанто-русский словарь.* М. 1982.

5. J.C. Wells: *Concise Esperanto and English Dictionary.* 1969, 1989.

6. Nur fine de la 19[a] jc la homaro trovis metodojn por fidinde gisi ŝtalon. En la napoleonaj militoj la pafilegoj ankoraŭ estis bronzaj; en la unua mondmilito la artilerio iĝis ŝtala.

7. E.-D. Krause: *Wörterbuch Deutsch-Esperanto.* Leipzig, 1983.

8. *Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj.* Raporto starigita de la scienca kaj teknika komisiono de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. (Direktoro: S-ro Rollet de L'Isle.) Kötzschenbroda-Dresden, 1911.

9. Jan Werner: *Terminologia kurso.* Sdružený ZK ROH Roudnice n.L., 1986. P. 70–71.

10. Eĉ la lingvo turka forlasis la senriproĉan tjurkan etimon de la rusa *чугун* (kiun retenis multaj aliaj lingvoj tjurkaj, de la ĉuvaŝa ĝis la uzbeka) favore al la malpli bona eŭropaĵo, strukture egala al *gisfero.*

11. Barna Buza: *La Zamenhofa spirito de la fakvortkreado.* SAEST 1982. P. 86.

## Vojaĝo al Kazohinio

Parolante pri lumpunktoj de nia literaturo, ofte oni iom minuskomplekse konstatas ke la koncerna verko elstarus en ajna nacia beletro. Tio tamen validas nur por garbo da ili, kaj *Vojaĝo al Kazohinio* (Parizo: SAT, 1958) de Sándor Szathmári (1897–1974) situas en la pinta kvino. Eŭgeno de Zilah nomas *Kazohinion* "la plej malkvietiga ĉefverko de nia literaturo".

La intrigon la katalogo de UEA unufrazas jene: «La ĉefrolulo post ŝippereo trovas sin en insulo kie vivas du kontraŭaj socioj: ĉe unu la tekniko malhomigis homojn, ĉe la alia superregas ekscesoj "artaj" kaj "religiaj"». Ni vidos ĉu tiu simpla priskribo ne tro simpligas…

La ŝippereinto estas Gulivero mem, el satira verko (1726) de Jonathan Swift, kiun Szathmári transportas en la nunon de la verkado. "Ĉi tie, Gulivero estas angla marist-kuracisto, kiel ĉe Swift, sed li aliĝas al la mararmeo en 1935, dum la milito de Italio en Etiopio". La akcidento portas Guliveron ĉi-foje en la socion de la hinoj. Tiu socio ankoraŭ ne estas "maŝinmondo" (tiel titoliĝis posta Szathmári-novelaro), sed la hinoj ŝajnas al ni maŝinecaj homoj sen sentoj. Iliajn rilatojn, ĉiun ilian geston plej rigore regas strikta logiko — mi preskaŭ skribis "senkompata", sed kompato, kun multaj aliaj konceptoj al ni kutimaj, ne havas lokon en la hina mondo. Kiam ili helpas kunhomon, ili helpas ne pro "kompato", sed ĉar la alia petis helpon, do li bezonas ĝin, sekve estus ne logike rifuzi (krom se la malutilo helpi misproporcius kompare al la donata helpo). Sian vivoregan logikon la hinoj nomas *kazo* — jen kial ili loĝas en Kazohinio. En la hina mondo oni manĝas ne por plezuro gusta, sed por sin nutri; ĉiaj formoj de arto estas juĝataj sennecesaj por la vivo; kaj ekburĝona "amhistorio" de Gulivero kun Zulema ne povas disflori en mondo kie amoro egalas al "seksa laboro" kaj amo estas plia neinterpretebla koncepto.

Ĉe la hinoj, ĉiuj korpaj bezonoj trovas senmankan (sed ne supernecesan) kontentigon — kaj aliaj bezonoj por ili ne povas ekzisti. Gulivero miras pri la supera tekniko kaj perfekta organizo de la hinoj, sed pli kaj pli suferas en tiu asepsa mondo. Li jam scias ke en la insulo ekzistas alia socio, tiu de la behinoj. Fine, kvankam malvolonte ĉar temas pri neraciaĵo, la hinoj permesas al li eklogi inter la behinoj. Jen, nia heroo finfine retrovas homojn kapablajn ridi, ami,




kanti, malami, batali… kiel hejmlande, ĉu ne? Sed li rapide devas lerni ke ĉe la behinoj manĝi estas plej kaŝinda hontaĵo, ke ĉe salutado nepras intergrati la postaĵojn kaj diri *pricc-prucc*, alie ja ne estas *belki*, nek *ketni*… Kaj se oni ne kondutas *ketnie*, oni suferas *enoon!* Ĉion ĉi malscias nur *bivagoj*, kiuj ankaŭ ne komprenas la sanktajn aŭ malsanktajn ideojn de *bikruo, borema, lamiko*, kaj precipe *kona* kaj *kemon*… Gulivero spertas ke la behinoj obeas kutimojn kiujn nenio pravigas krom kutimeco, kaj ke ili kapablas ĝismorte interbatali por ideoj komplete sensencaj!

Evidente, kiam brita ĝentlemano komparas tiajn fi-kutimojn kun la noblaj tradicioj de sia sopirata insula hejmlando, klaras kiu flanko gajnas en la komparo… Sed ĉu vere klaras? Ĉu eble tamen ĉiu lando, ĉiu kulturo havas siajn *ketniojn* kaj siajn *kona*? Aliflanke, kion pri la *kazo*? Ĉu iagrade ĝi regas la efektivan homan civilizon? Aŭ devus regi?

Tiel ekas la demandoj pri eblaj interpretoj de la romano. Plej ofte oni taksas ke la hina kaj behina duonoj montras — en malsame kurbaj speguloj — du komplementajn, sed egale troigajn karikaturojn pri nia civilizo. Ĉe tia interpreto, restas tamen ia malsato ĉe la leganto. Nome, kian mondon do taksi dezirebla se nek la hina nek la behina taŭgas? Ĉu ian oran mezan vojon inter la du?

Aliaj interpretantoj — kiel mentoro de Szathmári, Dezső Keresztury (postparole al la eldono en 1957), kaj István Simon (en *Opus Nigrum*, 1988, №3) — atentigas ke la aŭtoro havis tute klaran intencon: per la behina mondo li celis fortimigi nin, por des pli evidentigi ke la sola savo-vojo por la homaro estas ambicii al atingo de hina perfekteco. Se la pagenda prezo estas perdi niajn sentojn (*sentoj* estas samgrade sencohava vorto kiel *buku* kaj *ketni*, pensus hino), ni do perdu ilin. Se Budao-simile ni rezignus niajn superbezonajn havemojn kaj konkeremojn, tiam ĉesus milito, perforto, malŝpara misuzado de resursoj, kaj mil aliaj misfenomenoj plagantaj la hodiaŭan mondon.

Fakte, Keresztury kaj Simon konstatas ion principe evidentan. En sia postparolo al la dua eldono (1946), la aŭtoro ja donas detalan meminterpreton samsencan, kaj pledas senambigue por nia necesa hiniĝo. (Ni memoru ke tio okazis longe antaŭ postmoderno, kiam postparolo ne funkciis kiel rolluda masko.) Laŭ Szathmári, ĉio kio ne klarigeblas materie surbaze de la homa korpo mem, estas "memvibroj de la cerbo", devio kiu "diferencas nur laŭ la gradoj… Milito estas nur 180-gradiĝo de tiu devio, kiu komenciĝas per la muziko".

Pli interese, Eŭgeno de Zilah avertas (*La Gazeto*, 1999, №81): "La satiro de Szathmári nediferencige atakas ĉiajn konvenciojn: tiujn kiujn ni nomas malbonaj, kaj tiujn kiujn ni kredas bonaj. Li eble estas tiu el la utopiistoj, kiu plej bone elprovis, ĉu oni povas konstrui etikon surbaze de materiismaj-sciencismaj perspektivoj". Probable ne, konkludas Zilah, ĉar hineco eble estas nur speciala kazo de behineco. Kio ja garantius la absolutan superecon de *kazo*? Kial la hinoj rajtus atribui al si la certecon pravi solaj?

Fakte, se Szathmári vivus hodiaŭ, li, ĝisdata atentanto de sciencaj atingoj, nepre revizius sian mondkoncepton, ĉar multo el tio kion li opiniis "memvibro de la cerbo", havas ja biologian bazon…

La komplika eldonhistorio de *Kazohinio* (kaj ankaŭ la vivo de Szathmári!) meritus apartan artikolon. Ĉu la hungara aŭ la Esperanta versio naskiĝis la unua? Tiun demandon traktis en 1989, verŝajne kun definitiva valido, Éva Tófalvy, konstatinte plifruecon de hungarlingva versio.

*Kazohinio* estas unu el la tre malmultaj Esperantaj verkoj kiuj inspiris aliajn artojn. (Al tia sukceso kontribuis, kompreneble, ankaŭ ĝia statuso kiel "kulta" verko hungara.) Nome, ĝin filmigis Gábor Zsigmond Papp (1997): en la 50-minuta miksĝenra verko tri fakuloj, inter kiuj esperantisto Árpád Máthé, parolas pri la dornoplenaj vivovojo de Szathmári kaj eldonhistorio de *Kazohinio*, kun interaj scenoj el la verko mem.

**István Ertl**



# Poemoj de Baldur Ragnarsson

"… la internacia lingvo havas la kapablon ensorbi apartajn tradiciojn por doni al ili ian homan unuecon, samtempe lasante al ili ties apartecon. Kaj tio realiĝis en plej evidenta kaj perfekta maniero en la poezio de Ragnarsson, poeto samtempe islanda kaj internacia, kiu neimiteble fandis sian nacian devenon kun ĝenerale homa, preternacia filozofio kaj etiko", — skribis Mauro Nervi enkonduke al la tiama "plena originala verkaro" de Baldur Ragnarsson, *La lingvo serena* (Edistudio, 2007).

Profesie instruisto kiel William Auld, post ties morto Ragnarsson estas nia regula kandidato al literatura Nobel-premio. Longe li staris malmultvoluma (*Ŝtupoj sen nomo* 1959, *Esploroj* 1974), sed lastatempe li publikigas ion novan ĉiujare aŭ eĉ pli ofte (*La neceso akceptebla* 2008). Preter tio, li persiste tradukas islandajn samtempulojn kaj klasikaĵojn, kiel laste eĉ *La Edda* (2008).

Ragnarsson longe trenis reputacion de "malfacila" poeto. Tiun famon naskis probable opinio de Kalocsay, kaj postaj recenzoj. Ne mirinde se pensi ke lia poezio ŝovis la parnasismon de tiel-opiniantoj al beletra muzeo… Sed, se licas tiel diri, lia lastatempa produktado iĝis pli "alproksimigebla al meza leganto" (Szilágyi) — eble ĉar oni pli trasentas en ili la vejnon de instruisto, nun pli klariga kaj elmetada ol sintezanta en poeziajn densojn. Atestu tion ankaŭ la verkoj premierantaj ĉi-sube. **István Ertl**

## Legante la taglibrojn de Kafka

"Delonge nenion verkis. Komencos morgaŭ."

*Tiel Kafka en taglibro naŭan de julio
antaŭ jarcento minus jaroj du,
timante, ke la nervoj plagos plu;
en aŭgusto kulminis depresio,
ke li reale nenion jam atingis,
tio genion tamen ne estingis.*

*Pri liaj verkoj mi nenion diras,
tiel klarstilaj, tamen sence obskuraj
sufiĉe por liveri daŭrajn interpretojn
al adorantoj. Sed min tuŝas pli
liaj mensaj suferoj, tagoj intermuraj,
senracie perditaj en la pensajn retojn.*

*El liaj statoj, obsedoj kaj doloroj,
kreiĝis verkoj de registra sondo
pri embarasoj de homo, trovanta sin
fronte al la nekomprenebla mondo.
Ni tial rajtas supozi, ke lia sufero
estis por lia arto destina ofero.*

## Trakiaj bovinoj

*Kiam Sokrato partoprenis kiel hoplito
la batalon de Amfipolis, la Atenanoj
kolektis trakiajn bovinojn en valeton,
ke gardu ilin knaboj ne batalopovaj.*

*Tie li staris sur altaĵo praktikante
ekzercojn laŭ sia kutimo, plifortigajn
korpe kaj anime, atendante
varmiĝon de la matena suno,
kiam subite alkuris la Spartanoj
kun kaskoplumoj, signoj kaj kriaĉoj,
kaj la bovingardistoj, provizotenistoj,
soldatoj kaj oficiroj fuĝis
krurostreĉe, dum la bovinoj
nur ekmiradis: iuj muĝante sekvis
la kurantojn kelkapaŝe, dum iuj
sidiĝis kvazaŭ meditantaj
pri la fuĝo de la kuncivitanoj de Sokrato
aŭ pri la strangaj krioj de la Spartanoj.*

*Ke tio sparkigis konvinkon ĉe la filozofo
pri la fundamenta rolo de ekmirado
en serĉado de saĝo, tion mi volas kredi,
honore al la bovinoj de Trakio.*

## Malplenaj spacoj

*Malplenaj spacoj estas preferindaj
al rubo en anguloj, ĉar liberaj,
lasantaj lokon por spirado. Vortoj
silentas tie, tamen flustrojn
mi aŭdas, sporadajn, tre mallaŭtajn,
alportitajn el fontoj malproksimaj
lirlantaj milde, delikatajn signojn
sentrude instigantajn interpreton
laŭ gamo leĝera.
Sekretojn
mi ne atendas, nur atestojn
pri ekzisto sendependa de l' aferoj
de nia raso, konfirmojn pri la daŭro
de ĉio nerimarkita: obskuraj fontoj,
herboj sovaĝaj en ombritaj valoj,
surbordaj ŝtonoj mare glatigitaj,
ekzistoj senutilaj, tamen pli esencaj
al la planedo ol la falsa rajto
de nia raso okupi ĉiujn niĉojn.*

*Tial mi ŝatas la malplenajn spacojn
pli ol la okupitajn, ĉar nur en tiuj
eblas aŭskulti la voĉon de la tero,
malefemeran, kiu fine sonos
plenrajte sola post la interludo
nomata ŝerce civilizacio.*

## Troja ĉevalo rifuzita

*La fendojn ekzameni estas tikla afero,
ĉu eblus plilarĝigo ĝis aŭtentaj breĉoj
atendas pluesploron, dum regas la aŭstero
ankoraŭ tiujn murojn, aspektajn je stabilo,
necesas pacienco por trovi enirvojon
en urbon arogantan, defian je profilo.*

*Ni estu eltenemaj, trompemon ni evitu
malindan al honoro por superi Trojon,
ni rifuzu mistifikojn naskitajn el ideo,
sed uzu niajn ilojn, laboru kaj elŝvitu,
elstreĉu niajn fortojn kaj legendon spitu
ateste pri honesto dum dormas Odiseo.*

En la rubriko *Nia poezio*, prizorgata de István Ertl, jam aperis poemoj de Jorge Camacho (januaro), Mao Zifu (februaro), Gerrit Berveling (marto). Atendu pliajn poetojn…

## En labirinto de iluzioj

**Vondroušková, Ljubov. *Labirinto* = *Лабиринт* / Trad. el la rusa, postpar. Jaroslav Krolupper. — Brno: LYNX, 2009. — 60 p., il.**


**Vondroušková, Ljubov. *Iluzio* = *Иллюзия* / Trad. el la rusa Jaroslav Krolupper; Postpar. Ivo Pospíšil. — Brno: Onufrius, 2010. — 60 p., il.**

Rusa kultur-kleriga societo en Moravio eldon(ig)is poemlibretojn de Ljubov Vondroušková — rusa poetino, loĝanta en Brno — dulingve, rusajn originalojn paralele kun Esperantaj tradukoj de Jaroslav Krolupper. La unuan libreton *Mia ŝato* (2008) mi ne vidis, do nun mi pritaksas du aliajn: *Labirinto* (2009) kaj *Iluzio* (2010).

*Labirinto* enhavas kurtajn, ne pli ol 20-liniajn, poemetojn — plejparte lirikajn, parte filozofiajn. Temas pri profunde personaj travivaĵoj — pasinta amo, bedaŭro pri perdoj… Malgraŭ eternaj temoj, tamen senteblas "propra voĉo", la stilo tute ne simila aliajn poetojn.

Observemo pri la naturo, subtilaj emocioj… sed iam la ideojn preskaŭ ne eblas kompreni. Multas vortoj ne tipaj por poezio, apenaŭ troveblaj ĉe aliaj aŭtoroj — ĉu individua stilo aŭ influo de ĉeĥlingva medio? Jen aprilo *plenigis ĉielon per cignoj — flugilhava, kantanta* <u>*bagaĝo*</u>. En *Feliĉo* la traduko tekstas: "Fiŝovan lagan pensionon / elserĉas ĉiu fiŝoskvam'" — sed la rusa frazo estas same nekomprenebla, do mi ne povas ĝin traduki korekte.

La tradukoj plejparte estas sufiĉe taŭgaj, tamen io perdiĝas. Originale *Pardonu* estas akrostiko, per komencaj literoj de la versoj dufoje legeblas: POSPIŜIL, sed en la traduko tiu esprimilo mankas. Ritmo estas malsama ol la originala kaj ofte lamas. La senco plejparte estas transdonita adekvate, sed kelkloke aperas strangaj fantazioj: "Inkuboj ŝiras la memoron, / de mineksplodoj la impet'…" (*Epitafo*), kvankam origine la memoron turmentas sonĝoj per resonoj de minoraj (fulmo)tondroj. Kelkloke la ĉeĥa tradukisto simple ne komprenis la rusajn esprimojn, do rezulte "(aŭtuno…) viv-angulojn malordigis" (*Kontrastoj*), sed origine ĝi *disŝovelis karbojn* de la vivo (rusaj vortoj "angulo" kaj "karbo" por alinaciano malfacile distingeblas). Alia kuriozaĵo: "Eĉ guteto nepara ne iĝas" (*Ombro*) — ne vidante rusan originalon, ne eblas konjekti, ke tiel miskomprenita estas "i ni kapeljki ne rasstraivajusj", "mi neniom afliktiĝas", kaj guto estas nur kliŝa esprimo de eteco. Plurfoje videblas, ke la tradukinto elektis vortojn pro nura rimbezono, ofte tute malpoeziajn k apenaŭ kompreneblajn por ordinara leganto: "Supren celas *gruozom*'"; *apunt'* anstataŭ *spuro*. Ie sonas esprimoj ridinde strangaj: "Vakiĝos nia varmomagazen'…" (*Memoro*, origine "ni ne plu povos gardi varmon"); "Pluveto estas sur aprilprospekto" (*Aŭguroj*, "aprilo ne imageblas sen pluveto"). Tro multas adasismoj. Aperas malbelaj kunmetaĵoj: tempkur', sunpanbul'.




Gramatikaj eraroj ne multas, sed agacas, temas pri sistema miso: "Al revojn nokt' instigas", "minutoj, subigitaj al destinon". Preskaŭ tute forestas interpunkcio.

*Iluzio* havas iom alian karakteron. Tie estas nur izolaj sentitolaj verskvaroj, malofte 5- aŭ 6-liniaj versaĵoj. En la postparolo, ĝenerale komplimenta, Ivo Pospíšil skribas: "ĉi tiuj versoj kvazaŭ estus leĝerigitaj, utiligantaj ludemon, vortoĵongladon; ŝajnus, ke ĉi tie Ljubov Vondroušková (…) atingis preskaŭ danĝeran majstrecon. Sed tio estas feliĉe nur ŝajno". Konsentite, la majstreco estas ŝajna — kvankam la kolego celis diri la malon. Kelkaj pecoj restas tute nekompreneblaj malgraŭ plurfoja relego, kelkaj kaŭzas nur ridaĉon. Iam ŝajnas, ke la poetino forgesas la rusan lingvon, kaj la tradukanto jen penas (foje sukcese) ordigi ŝiajn fuŝajn ideojn, jen mem senbride fantazias: ruse la nuna tago "ĵetis la spiriton supren", en traduko ĝi "en la menson venton semis". Aliloke origine mensogo estas kiel pediko, pikas ne forte, sed lasas profundan spuron en animo, mortigante la *bluan koloron* de fidemo; en traduko "Mensog' — buldog' / eĉ nura graŭlo / en anim' profunda spuro. La fidemon ĝi forbekas / kiel la vulturo". Imagu la buldogon, kiu bekas, kaj vi tuj rememoros faman konsilon el *La Arto Poetika* (*Parnasa Gvidlibro*): "Se al *abismo mara* vi komparas / la amon, kaj tujsekve tie staras, / ke ĝi tra l' koro *pikis per ponardo*, / vi, kara, estas tre konfuza bardo…"


Denove aperas strangaj esprimoj kiel "de tristaj mensoj muta koncerto" kaj vortoj nekonvenaj por poezio — *gad'*, *splisi*, diversaj kancelariaj kaj juraj terminoj kaj simple balastaj vortoj. La plej ridindan tiurilate versaĵon (p.52) mi ne citos, ĉar tradukite ĝi estas simple banala.

Denove la tradukanto miskomprenas rusajn esprimojn: ruse "kiel larmo" signifas "plej pura", kio tute ne tradukeblas "aero kiel ploro". "Ĥmeljnoj nastoj" estas ne "esenco de lupol'", sed nur "ebriiga trinkaĵo", ktp.

Entute, tre strangan impreson lasas la libretoj. Io aspektas kiel kompleta fuŝo, io ridigas, sed plurloke tamen — mi denove citu el la postparolo de Ivo Pospíšil — "malantaŭ la ludemaj versetoj kaŝiĝas eretoj de interna tristo. (…) Ŝajnas, ke la poetino atingis la evolukrucvojon: kion novan ŝi gajnos de la konflikto inter niaj du tiom distaj kulturoj [rusa kaj ĉeĥa — VMel] (…)" En komplimenta ekstazo la kolego komparas poezion de Vondroušková kun tiu de ŝia samlandano Puŝkin — kio tutcerte estas tro.

Tamen ja io alloga kaj pensiga troveblas en ŝiaj versoj, serĉu do en tiu labirinto de iluzioj…

**Valentin Melnikov**



## Utila bibliografio


**Haupenthal, Reinhard. *Gaston Waringhien (1901–1991). Bibliographie seiner Veröffentlichungen = Bibliografio de liaj publikigaĵoj.* — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2009. — 60 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; Heft 14).**

La nuna verko eniras la vicon da personaj bibliografioj, kiujn skrupule kaj profesiece pretigis Reinhard Haupenthal. Al Albault, Burkhardt, Diego, Régulo kaj Vatré aldoniĝis unu el la plej gravaj kaj multflankaj esperantologoj kaj interlingvistoj — Gaston Waringhien.

La libro esence kunigas la du bibliografiojn: el la fest-libro *Li kaj ni* (1985) kaj ties suplemento en *Iltis-Forumo* (1991:3). Ĉefaj verkoj de Waringhien estas listigitaj ankaŭ en *Gaston Waringhien, heroldo de la internacia lingvo* de André Cherpillod, kiu priskribas diversajn facetojn de la granda franco, kiel gramatikisto, beletristo, tradukisto, leksikologo ktp, escepte de recenzanto. Sed ni revenu al la kompilaĵo de Haupenthal.

Haupenthal notas la bibliografiajn datenojn de libroj kaj revukontribuoj de Waringhien inter 1921 kaj 2005 (laste temas pri *La Nova Plena Ilustrita Vortaro*). Estas registritaj 639 eroj el la plumo de Waringhien. En la verko estas aplikata kronologia principo. La sinsekvo de la eroj: 1. monografioj propraj aŭ kunaŭtoraj; 2. kontribuoj al monografioj (pluraŭtoraj verkoj, antaŭparoloj ktp.); 3. kontribuoj al revuoj (laŭ la alfabeta ordo de la revuoj). Cetere, en 23 revuoj estas trovitaj la kontribuoj de Waringhien. Troviĝas referencoj al postaj eldonoj aŭ reapero de artikoloj en libro. Ĝuste ĉi tie mi trovis eraron, eble mistajpon: unu el la referencoj por la verko sub numero 635 estas malĝusta. Embarasis min *Alilingvaj erotikaj poeziaĵoj* sub numero 638, eldonita en 2003 en la serio *La Krom-KancerKliniko.* Bonŝance la libreto estas en nia biblioteko, kaj mi povis konstati, ke Waringhien estas plurlingva poeto. Krom poeziaĵoj el *Libro de amo* kun la aŭtoraj tradukoj esperantlingvaj, en ĝi estas premiere eldonitaj franclingvaj versaĵoj tradukitaj de Georges Lagrange kaj Michel Duc Goninaz.

Por ne tro ampleksigi la verkon, la aŭtoro rezignis pri finaj indeksoj. Estas inkluzivitaj ankaŭ verkoj aperintaj kun diversaj pseŭdonimoj.




Dise aperintaj tradukoj de Waringhien poste reaperis libroforme. Pli gravaj artikoloj trovis sian lokon en la kvin volumoj de liaj eseoj. Apartan volumon povus formi la plej gravaj recenzoj. La nuna bibliografio donas bonan imagon pri Waringhien-recenzanto. Biografia resumo de lia vivo kompletigas la tuton. Ĝi kaj la antaŭparolo aperas dulingve: en la germana kaj en Esperanto.

La simpatian portreton de Gaston Waringhien, kiu ornamas la kovropaĝon, oni dankas al lia filino.

Bonvenigante la nunan bibliografion, ni esperu je apero de pliaj kompetente kompilitaj listoj, kiuj ebligus aliron al verkoj de niaj eminentuloj ofte dissemitaj tra la Esperanta gazetaro kaj kun paso da jar(dek)oj falantaj en forgesitecon.

**Halina Gorecka**

## La sepa *Beletra Almanako*




Originalan beletron en la februara *Beletra Almanako* prezentas *Sinjor' Nenio* de Bjørn A. Bojesen kaj *Varme vama verko* de Jorge Camacho (en formo de recenzo). Pluraj poemoj el *Se iĝos rosoj ulmoj*, ankoraŭ ne eldonita, daŭre verkata dua poemaro de Nicola Ruggiero aperas sur dek unu paĝoj.

Gerrit Berveling per sia traduko el la greka donas fragmenon el *La Mensogamiko aŭ la dubanto* de la satiristo Lukiano, vere amuza peco. Alispecan rakonton prezentas *Revaz* de la oseta aŭtoro, kaŝanta sin sub la nomo de Ĝoni Ramonov. La tradikinto Slavik Ivanov enkonduke skribas, ke la furorinta en Osetio (regiono en la sudo de Ruslando) rakonto "priskribas la vivon de elita junularo", en kiu multaj rekonas konatojn aŭ sin mem.

Gerrit Berveling tre trafe obĵetas la eseon de Lena Karpunina *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn*, premiitan en la Belartaj Konkursoj kaj publikigitan en BA-6. Kiel eldonistino, longatempa prizorganto de biblioteko kaj librokolektantedzino mi plene konsentas kun lia argumentaro.

Christian Declerck artikolas pri *Poetoj ne povas ne poemi pri poezio* kaj Antonio Valén per kolekto da personaj impresoj omaĝas al la forpasinta Madeleine de Zilah. La eseo *LKK krias ja* de Kris Long plenas je nomoj kaj aludoj, verk- kaj vivhistorietoj. Legu kaj provu kompreni.


Recenza eseo de Carlo Minnaja *Dante laŭ Dondi* revuas la aperintajn tradukojn el Dante, ekde la fragmentoj ĝis la libroformaj eldonoj: *Infero* en tercino en la traduko de Kalocsay (1933), la tuta *Dia komedio* en blankaj versoj far Peterlongo (1963) kaj, fine, la tuta *Komedio* tradukita de Dondi, eldonita de *Fonto* en tri volumoj en 2006.

La recenza fako estas tre ampleksa. Ricardo Felipe Albert Reyna kompetente esploras La *Trezoro de arabaj proverboj kaj anekdotoj* de Husajn Mahamad Al-Amili, la libro estas laŭ li, "pordo al la nuntempa araba mondo". La etoson de *Dormanta hejmaro* (Manashi DasGupta, trad. el la bengala Probal Daŝgupta) li karakterizas kiel tiu de premsonĝo. Por Valentin Melnikov estas interese "vidi propran landon per okuloj de fremdulo" en la *Vojaĝimpresoj el Siberio kaj Japanio* de Gerrit Berveling, kiu trajnveturis Ruslandon en la internacia grupo celanta al la UK en Jokohamo. Jorge Camacho analizas du poeziajn librojn: *Yvonne. Sonetoj malsekretaj* de Timothy Brian Carr kaj la kolekton de naŭ irananoj *Versoj de persoj.* Du librojn de la nederlandano Louis Couperus, *Fatalo* kaj *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj*, ambaŭ en la traduko de Gerrit Berveling, prikonsideras Anna kaj Mati Pentus.

La ruĝa krabo sur blanko altiras la atenton sur la kovropaĝo de la BA. Ĝin kaj ĉiujn enajn bildojn aŭtoris Makis Malafékas.


**Halina Gorecka**


# Virtuala biblioteko de "Sezonoj"










En la redakcia komentario (p. 2) vi povis legi, ke ni komencis eldoni elektronikajn librojn. Nuntempe en nia kiosko (http://www.esperanto.org/Ondo/Libroj/Libroj.php) estas ekzemplero de *La Ondo* kaj kvar libroj el la *Virtuala biblioteko de Sezonoj*:

*La pika damo* de Aleksandr Puŝkin (tradukis Aleksander Korĵenkov).

*Sveda alumeto* de Anton Ĉeĥov (Aleksander Korĵenkov).

*La falo de la domo Usher* de Edgar Allan Poe (Edmund Grimley Evans).

*Blankaj noktoj* de Fjodor Dostojevskij (Grigorij Arosev).

La libroj estas en la formatoj pdf kaj epub. La formato pdf estas legebla en diversspecaj komputiloj helpe de la senpaga legoprogramo *Adobe Acrobat* kaj aliaj similaj programoj.

La formato epub estas la plej populara formato de "inklibroj"; epub-librojn oni povas legi per multaj (sed ne ĉiuj!) specoj de legiloj (angle: eReader). Se vi ne havas legilon, vi povas legi inklibrojn en via komputilo helpe de la senpaga programo *Adobe Digital Editions* (http://www.adobe.com/products/digitaleditions/). La uzantoj de la retumilo *Mozilla Firefox* povas legi inklibrojn helpe de la senpaga programeto *EPUB Reader* (http://addons.mozilla.org/ru/firefox/addons/versions/45281#version-1.2.8.1).

Dume oni povas uzi la kioskon tute senpage, sed poste kelkaj novaj eldonaĵoj estos nemultekoste aĉeteblaj en ekstera retbutiko. Dum la unuaj sep semajnoj de la funkciado de la kiosko oni elŝutis pli ol du mil ekzemplerojn de libroj. **AlKo**

## Ricevitaj libroj

Haupenthal, Reinhard. *Gaston Waringhien (1901–1991). Bibliographie seiner Veröffentlichungen = Bibliografio de liaj publikigaĵoj.* — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2009. — 60 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; Heft 14). — [Recenzoekzemplero].

Klag, Walter. *Sat.iroj ne nur el Aŭ.strio*. Unua kajero. — 4a eld. — Vieno: Klag, 2009. 16 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Klag, Walter. *Sat.iroj ne nur el Aŭ.strio*. Tria kajero. — 2a eld. — Vieno: Klag, 2009. 16 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

*La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin* / Red. Detlev Blanke, Ulrich Lins. — Rotterdam: UEA, 2010. — 901 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Vajs, Ján. *100 gravaj personoj de slovaka Esperanta movado = 100 významných osobností slovenského esperantského hnutia.* — 2a eld. — Partizánske: Espero, 2009. — 52 p.; il. — [Donaco de Peter Baláž].

Vondroušková, Ljubov. *Labirinto = Лабиринт*: [Dulingva poemaro] / Trad. el la rusa, postpar. Jaroslav Krolupper. — Brno: LYNX, 2009. — 60 p., il. — [Recenzoekzemplero].

## Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako, 2010/7; Dia Regno, 2010/1; Esperanta Finnlando, 2010/1; Esperanto aktuell, 2010/1; Esperanto en Danio, 2010/1; Esperanto, 2010/2,3; Femina, 2010/21; Frateco, 2010/87; Ĝenerala Informilo, 2010/159; Heroldo de Esperanto, 2009/17, 2010/1,2; Informa Bulteno, 2010/1; Informilo por Interlingvistoj, 2010/1; Internaciisto, 2010/1; La Brita Esperantisto, 2010/968; La Gazeto, 2010/146; La KancerKliniko, 2010/133; La Movado, 2010/707,708,709; La Ondo de Esperanto, 2010/3,4; La Revuo Orienta, 2010/2; La Sago, 2010/62,63; Literatura Foiro, 2010/243; Lumo, 2009/2; Monato, 2010/3,4; Norvega Esperantisto, 2010/1; Scienco kaj Kulturo, 2010/2; Scottish Esperanto Bulletin, 2010/1; Sennaciulo, 2010/1-2,3-4; Spegulo, 2010/1; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2010/1; Verda Saksofono, 2010/1.

## *Literatura Foiro*, 2010, №243

Per nova aŭtora rubriko startis la 41a jarkolekto de *Literatura Foiro*, en la februara numero 243.

La ĉefredaktoro Ljubomir Trifonĉovski proponos en la nuna jaro sian kulturan agendon: ses gravaj eventoj de la ses artoj en la ses numeroj de la revuo estos en la fokuso. En februaro, kompreneble por la dramaturgo, gastas teatro: *Molloy* de Samuel Beckett irlande interpretita.

La sepa arto same ekzistas en la numero, per recenzo de Giorgio Silfer pri la ĵusa filmo *Avatar*. Kaj pri la esperant(ist)a pentroarto en la verda gazetaro: Perla Martinelli prezentas la aŭtorinon de la bildoj sur la kovropaĝoj de *Literatura Foiro*, nian meksikan civitaninon Leonora González, kiu dediĉis al la Zamenhofa jubilea jaro ses kolorajn bildojn.

Nia libromerkato: Leif Nordenstorm rekomendas la porinfanan libreton *Rimenigmoj* de Elena Popova, Nikola Uzunov prezentas la Esperantan version de *Labirinto* de Ljubov Vondroušková, Donald Broadribb periskopas la ĵusan romanon de Istvan Nemere *Serpentoj en la puto*, Till Dahlenburg analizas la originalan poemaron *Kajto* de Mikaelo Bronŝtejn.

Originala literaturo: poeziaj impresoj el Japanio de Marie-France Conde-Rey uverture kaj rakonto de Jordan Slavejkov meze de la kajero. Márton Fejes prezentas Esperantan epizodon, fakte E-kurson en la romano *Maldungita legio* de la hungara verkisto György Moldova. Mondliteraturo: Andreas Künzli rakontas pri tri famaj svisaj verkistoj, kiuj forpasis en la pasinta jaro.

La dua parto de la eseo de Carlo Minnaja rememorigas la centjaran datrevenon de Ivo Lapenna. Belka Beleva aldonas pri Lapenna kaj Internacia Arta Teatro.

Francisko Degoul recenzas *Homaranon*, pro kiu Aleksander Korĵenkov ricevis la premion *La Esperantisto de la Jaro 2009*. La unua numero de la nova periodaĵo *Homarane* estas promociita en LF per intervjuo kun la ĉefredaktoro Bertil Nilsson kaj prezento de ties riĉa enhavo.

Adiaŭe al la redakciano Dimitar Haĝiev aperas lia lasta kontribuaĵo pri la kontribuo de la litova kaj belorusa lingvoj en la kreo de Esperanto. Kaj neebla intervjuo vojaĝe al Lirey, el la plumo de Armando Zecchin.

**HeKo**

Sep personoj konkursis pri elspurado de vortoj ligitaj kun la vintraj sportoj. Ĉampionis Edmundo kun 16 vortoj, nur je unu vorto postsekvis lin Jackie, kaj la aliaj konkursantoj postrestis nur je unu-du spiroj. *Jen la kompleta vortolisto*: Alvalado, bobsledo, golulo, hokeo, kristianio, pirueto, skeletono, sketado, sketilo, skiado, skisaltejo, slalomo, sledo, ŝuingo, ŝusado, telemarko, tobogano. *La sporta teamo*: Edmund Grimley Evans (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Dorota Burchardt, Hanna Skalska (Pollando), Bronislav Ĉupin (Ruslando).

La libropremion ricevas ***Edmund Grimley-Evans***. Ni gratulas lin!

## Birda bazaro

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| n | a | r | o | m | r | o | k | a | p |
| p | a | v | a | s | t | a | g | l | e |
| b | n | a | j | t | i | n | g | a | l |
| m | a | n | g | r | p | a | r | ŭ | i |
| o | s | i | b | i | i | k | i | d | k |
| l | e | o | n | g | c | u | f | f | a |
| o | z | v | r | o | k | t | ĉ | u | n |
| k | a | g | e | p | a | p | a | g | o |

Trovu bird-specojn, kaŝitajn en vertikalaj kaj horizontalaj linioj. Oni povas legi vortojn en ajna direkto (supren-malsupren, dekstren-maldekstren). Vortoj povas havi komunajn literojn. La solvojn venu al la redakcio antaŭ la 10a de junio 2010.

Kompilis **Aleksej Korĵenkov**

### Juda humuro

#### Kirlenda teo

La lernanto Mordĥe demandas la saĝan instruiston-rabenon:

— Pro kio estas la teo dolĉa: ĉu pro la sukero aŭ pro la kirlado?

— Pro la kirlado, kompreneble.

— Do, tiukaze, pro kio ni metas en ĝi la sukeron?

— Por ke ni sciu ĝis kiam ni devas kirli.

#### Kolegaro

Kohen devas skribi oficialan leteron sed li neniel kapablas komenci ĝin. Lia amiko Levy deziras helpi al li kaj diras:

— Komencu simple per la vortoj: "Tre estimata sinjoro…"

— Ĉu tre estimata sinjoro? Sed tiu homo estas unu el la plej friponaj sentaŭguloj!

— Do tiukaze komencu tiel: "Kara kolego".

El la kolekto de **Josi Ŝemer**

## Spritaj splitoj kaj preskeraroj

### el la kolekto de reduktoro

**Rompi kun malnovaj metodoj, aŭ: Radikala plisanigo**

Sciencaj novaĵoj: Ostrorompo — nova metodo de kuracado (*Pola Esperantisto*, 2010, №1, p. 49)

**Eksiĝoj transtombaj, aŭ: Manipulo eĉ postmorte**

Estas malprobable ke LF-koop omaĝos al la tre malmultaj kooperintoj kiuj eksiĝis antaŭ sia morto. (HeKo, №432 2-B, 7 apr 2010, www.esperantio.net/index.php?id=1248, stato 8 apr 2010)

**Knedu lin, gesinjoroj, aŭ: Obamasaĝo**

La fakkunsido de Grupo de Artikolo Naŭa en la kadro de la 96a Japana Esperanto-Kongreso rezoluciis sendi jenan masaĝon al Prezidanto Obama… (Satoo Morio. *Mesaĝo al Prezidanto Obama // La Movado, 2009, №706, p. 8.)*

**La fortoj malantaŭ Obama**

… fundamentaj fortoj [en Usono] ankoraŭ ĉiam funkcias kaj balotis Obama al prezidato. (Eugen Macko, 1 nov 2009, www.liberafolio.org/2009/nobelpremiito-obama-akuzata-pri-esperantismo/#1257094217)

**Al manko, al manko, al fina glora mank'!**

UEA-libroservo: … Beletra Almanko 2. (Marto 2008). (*Argentina E-Vento*, 2008, №34, p. 6)

**Tondu la EU-ŝafonà!**

LABOROLANO DE EEU POR 2010 (Zlatko Tišljar, groups.google.com/group/europo2, 9 mar 2010; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

**Ĝis skeletiĝo**

… individuoj oste detruas malrapide iom post iome konstruatan planon de la estraroj.

(Zlatko Tišljar, groups.google.fr/group/europo2/browse_thread/thread/b5ca742013970127, 24 feb 2010; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

**Forkuru de larmoj, aŭ: La vetkuro de mallarmado**

Laŭ mi plej gravas eviti infanojn plorantajn kaj tiel malĝojajn, ke ili ne plu volas veni al REF… (Bert Schumann, groups.yahoo.com/group/REFanoj/message/539, 10 mar 2010)

**Pri belgoj neniam tro malfrue**

Hodiaŭ Pieter Jan Doumen parolos pri la antikvaj Belgoj, kontraŭ kiuj batalis Julio Cezaro. Nu, ne tro frua informo sendube vi pensos. (Agnes Geelen, *Listo de la membroj de la antverpena Esperanto-grupo*, 19 feb 2010)

Plukis **István Ertl**

Se vi scias kaj ŝatas kompili enigmojn, ŝaradojn kaj aliajn konkurstaskojn, vi estas bonvena kiel kunlaboranto de *Mozaiko*. Ni invitas ankaŭ karikaturistojn kaj humuristojn. Anoncu vin ĉe la redakcio.

# Muzo-10

Dum BET-46 (26 jun – 4 jul 2010, en Visaginas, Litovio) okazos la belarta konkurso Muzo-10.

La konkurso okazos en jenaj branĉoj:

1. Prozo originala (noveloj)
2. Poezio originala
3. Deklamado (recitado de poeziaĵo laŭ propra elekto)
4. Kantado sola aŭ grupa (po unu kanto)
5. Fotoj pri ajna temo (ne pli ol po du, papera kaj elektronika variantoj)

Anoncitaj kaj honoritaj estos gajnintoj de la unuaj tri lokoj en apartaj konkursoj.

Konkursaĵoj pri originalaj prozo kaj poezio devas esti anonimaj. La nomo kaj adreso de la aŭtoro devas esti skribitaj sur aparta slipo, metita en pli malgrandan koverton kun surskribo de titolo de la konkursaĵo.

La konkursaĵoj devas esti senditaj ĝis la 1a de junio 2010 al Jūratė Bartaškienė, Kalvarijų biblioteka, Kalvarijų g. 29, Vilnius LT-09313 Litovio.

Laŭ interkonsento kun la organizanto, s-rino J. Bartaškienė, konkursaĵoj povas esti akceptitaj ankaŭ la unuan tagon de BET-46.

☎ +3706 006 6865

💻 bjurateomatic7@gmail.com






**Ruslando**. 27 mar en Uljanovsk okazis la 8a Lingva Festivalo, en kiu estis prezentitaj pli ol 20 lingvoj, ties popoloj kaj kulturoj. Oni povis kanti diverslingvajn kantojn, rigardi kaj tuŝi naciajn vestojn, partopreni konkursojn. Sur la foto estas la prezentintoj de la tatara lingvo. *(Jurij Karcev / Stepan Korsakov)*




**Esperanto-urbo**. Lernejanoj el Nicolai Grundschule (Germanio), Komlóstetői Általános Iskola (Hungario) kaj Bar Hill School (Britio) renkontiĝis 9–13 apr en la Esperanto-urbo Herzberg por studado, ekskursoj, amika kunestado kaj por kantado kun la brita instruisto Tim Morley. *(Małgosia Komarnicka)*



**Germanio**. Inter la tradiciaj Paskaj esperantistaj renkontiĝoj la plej konata estas la Printempa Semajno Internacia, kiu ĉi-jare okazis la 26an fojon kun pli ol 160 partoprenantoj el 17 landoj (p. 6). La PSIanoj, inter kiuj estis multaj infanoj, ĝuis la riĉan programon kaj multe amuziĝis dum vesperoj. *(Jörg Gersonde)*





Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
Serio *Mondliteraturo*, Volumo 16
200 paĝoj, 18 eŭroj




Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
Serio *Mondliteraturo*, Volumo 15
208 paĝoj, 20 eŭroj




István Nemere. *Serpentoj en la puto*
Originala romano pri terorismo
184 paĝoj, 18 eŭroj




Georges Simenon. *Maigret eraras*
Serio *Mondliteraturo*, Volumo 17
128 paĝoj, 12 eŭroj.

*Mendu en via kutima libroservo*